

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1

1998

ISSN 0032 - 4361


BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KULĖsperanto v. 19034/  
1998



*Novjara saluto  
Grupiĝo de ĉina  
entreprenoj*

*Anekdotoj pri tigro*



Vespera krepusko

Foto de LIU CHUNCHI

## INTER NI

Oni diris al mi, ke neniam ĉinoj salutas per manpremo, ĉu vere? En nia lando manpremo estas kutima, kiam oni bone konas unu alian. Ĉu vi povas respondi al mi?

**ODETTE BERNET** (Francio)

Mi volas scii pri ĉinaj laborkondiĉoj kaj socialaj asekuroj okaze de malsaneco, senlaboreco kaj pensioj por dungitoj.

**GERRIT BRONS** (Nederlando)

Mi volas scii pri la sciencoj kaj historio de Ĉinio, pri la funkcio de Hongkong reveninta al Ĉinio.

**HALDO VEDIN** (Svedio)

Mi ŝatas scii pli pri (a) la instruado ĝenerala — eble kun skemo de la lerneja sinsekvo: baza lernejo → daŭriga instruado → universitata allaso; daŭro meza de diversaj tipoj ktp.; kiuj eblecoj prezentiĝas, kiam oni loĝas en la kamparo ks.; (b) kiel oni lernas teknikan me-

tion aŭ profesion? (c) kiamaniere komputero rolas en diversaj lernejoj?

**TAMMO KANTER** (Nederlando)

Kiel progresas la laboro ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero? Surprizas min ke oni decidis fari gigantan digon sur tiu rivero.

**BRUNO NAJBARO** (Britio)

Ĉu la naturo suferas de novaj industri-ekonomiaj regionoj? Ĉu ili ekzistas harmonie?

**DAŜEVSKIJ LEONID** (Rusio)

Laŭ EPĈ mi havas impreson, ke ĉinoj vivas ĉiutage feliĉe kaj aktive sen problemoj. Ĉu vere? Eĉ en Esperantio ekzistas konfliktoj aŭ malagrablaĵoj. Estas nature, ke ĉiutaga vivo envolvas krimojn aŭ malagrablajn problemojn. Mi esperas, ke EPĈ raportos ankaŭ tiujn temojn krom laŭdindaj raportoj.


**KENMOTU KENSAKU** (Japanio)

02.3193



# El Popola Ĉinio

1 [472] 1998



En frosta vintro multaj gejunuloj ŝatas sketadon. Vidu, kiel gaje sin distras sur glacio tiuj junulinoj en parko de Pekino.


Foto de Zhao Xi

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
 Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"  
 Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"  
 Direktoro: Hou Zhiping  
 Adreso: P.O.Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio  
 Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

# ENĤA VOJO

- |   |  |
|---|--|
| <p>2 INTER NI<br/>                 4 Novjara saluto<br/>                 5 Nutraĵo kreita de la spaco<br/>                 6 JUNULARO:<br/>                 Junaj gepatroj<br/>                 8 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:<br/>                 Pri "kabaretoj"<br/>                 10 Kavalirino kaj ŝia kavaliro<br/>                 12 ORIGINALE VERKITAJ:<br/>                 Du nubetoj; Asta<br/>                 14 SUR NIA LIBROBRETO: Libroj ricevitaj de EPĈ kaj ĈEB (I)<br/>                 15 POR KOMENCANTOJ:<br/>                 Lumigi vojon por aliaj<br/>                 16 ESP-NOVAĴOJ<br/>                 17 Turisma vidindejo Wutai-monto<br/>                 20 EKONOMIE:<br/>                 Grupiĝo de ĉinaj entreprenoj; Arbarizi kalvajn montojn; Kurantaj aferoj<br/>                 22 La mondo en la okuloj de ĉinaj diplomatoj<br/>                 24 Popolmuzika festivalo en Finnlando<br/>                 25 EN ĈINAJ URBETOJ:</p> | <p>En urbeto, iama fortreso<br/>                 28 Revo de ĉinaj piedpilkomaniuloj<br/>                 29 LAŬ LA SILKA VOJO:<br/>                 Fajro-baseno Turpan<br/>                 36 ĈINA KULTURO:<br/>                 Anekdotoj pri tigro<br/>                 38 Besto-protektado en Ĉinio<br/>                 40 ORDINARAJ ĈINOJ:<br/>                 Instruistino Wan kaj ŝiaj kolegoj<br/>                 42 Kolektado de olelampoj<br/>                 44 EL ĈINAJ GAZETOJ<br/>                 46 Legemaj pekinanoj<br/>                 48 POR VIA SANO:<br/>                 Pri San-protektado<br/>                 49 Saniga ekspreso<br/>                 51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:<br/>                 Bronzaĵo kun figuro de rajdanto<br/>                 2 Vespera krepusko<br/> <b>SUR LA DORSKOVRILLO:</b><br/> <b>[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]</b><br/>                 Vintro en Estonio;<br/>                 Montaro en centra Italio</p> |
|---|--|



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                         |                        |
|-------------------------|------------------------|
| 1. Changchun (p. 20)    | 4. Lanzhou (p. 44)     |
| 2. Fuyang-urbeto (p.25) | 5. Wutai-monto (p. 17) |
| 3. Fuyang (p. 41)       |                        |

# Novjara saluto

**E**N la jarŝanĝa festotago mi kore deziras al ĉiuj niaj legantoj, perantoj, amikoj kaj iliaj familioj prosperan novan jaron, nome de la estraro kaj gekolegoj de la redakcio de *El Popola Ĉinio*.

Ĉe la komenco de la nova jaro konvenas iom rigardi malantaŭen kaj antaŭen.

Leginte la leterojn kaj enketilojn de legantoj, ni kun granda ĝojo konstatis, ke niaj klopodoj en 1997 por plibonigi nian revuon ricevis ilian jeson, kaj nia revuo daŭre plaĉas al ili. Ni ŝuldas niajn sukcesojn al niaj legantoj kaj perantoj, kiuj helpis nin per konsiloj, propono de temoj, kontribuajtoj, abonoj kaj abonigoj, kaj konstanta diskonigo de nia revuo.

Ni aparte dankas la samideanojn, kiuj donacis monon al la Fondaĵo EPĈ-abono. Iliaj donacoj ebligis ĝui nian revuon al multaj samideanoj kun financaj malfaciloj aŭ transpagaj problemoj.

Nian koran dankon meritas ankaŭ la samideanoj, kiuj elesperantigis artikolojn de nia revuo por lokaj ĵurnaloj kaj revuoj. Tio ne nur helpis konigi Ĉinion, sed pli grave, konvinkis neesperantistojn pri la praktika valoro de Esperanto.

Niaj sukcesoj eble ne estas tre signifaj, tamen ili nutras al ni iom da kuraĝo por daŭrigi niajn klopodojn ankaŭ en 1998.

Revuoj sen distingiĝaj trajtoj ne havas vivforton. La trajtoj de nia revuo estas uzi kaj praktiki Esperanton por konigi Ĉinion al diverslandaj esperantistoj kaj por



La aŭtoro

kontribui al la tutmondigo de Esperanto, la interkompreniĝo, la interfratiĝo, la mondpaco kaj la progreso de la homaro. Por pli bone elstarigi tiujn ĉi trajtojn, ni vidas por 1998 kvar prioritatojn.

Unue, helpi al niaj legantoj pli bone koni Ĉinion pasintan kaj nuntempan, precipe la ĉinan popolon en la moderniga konstruado por altigi la vivnivelon. En 1998 la rubrikoj restos senŝanĝaj. En la julia numero la rubriko "Laŭ la Silka Vojo" adiaŭos niajn legantojn, kaj en la aŭgusta premieros nova rubriko pri ĉinaj naciaj kostumoj. Ni aperigos kiel eble plej mallongajn artikolojn, aldonos humuraĵojn kaj ludojn, prezentos pli ĉarmajn kaj vivecajn bildojn kaj pli vigle aranĝos la paĝojn. Ni sincere esperas, ke niaj legantoj ne hezitos doni al ni opiniojn, sugestojn kaj eĉ kritikojn.

Due, zorgeme redakti ĉiujn Esperanto-rubrikojn. Por fari ilin pli buntaj, tre gravas la tema diverseco. Ni ne nur daŭre disponigas paĝojn por krei pli ampleksan

transnacion Esperanto-kulturon, sed ankaŭ planas aperigi raportaĵojn pri movadaj sukcesoj en diversaj landoj, precipe en aziaj landoj, kaj pri atingoj de la "Kampanjo 2000" de Universala Esperanto-Asocio. Sekve, ni kore petas kontribuajtojn por diversaj temoj: E-novaĵoj, originale verkitaj noveloj, prozaĵoj kaj poemoj, esperantologio, diskutoj pri lingvaj demandoj, facilaj legaĵoj por komencantoj, movadaj raportaĵoj, junularaj demandoj, humuraĵoj, ludoj, enigmoj ktp.

Trie, plimultigi abonantojn, ĉar sen sufiĉe da abonantoj nia revuo ne povas bone funkcii. Pro la leviĝo de la afranko ni estas devigitaj altigi la sendokoston por 1998, kaj tio ankaŭ estas granda defio por ni. Ni faros ĉion eblan por eviti la falon de la nombro de abonantoj. Certe ne malhaveblas ankaŭ la subteno kaj komprenemo de niaj legantoj kaj perantoj.


Kvare, gajni pli da monrimedoj. Nun ni devas kovri ne nur la afrankon de ĉiuj niaj sendaĵoj, sed ankaŭ parton de la eldona kosto. Pro tio, gajni pli da monrimedoj estas ege grave por la daŭra ekzisto de nia revuo. Por tio Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu estas integra parto de la redakcio de *El Popola Ĉinio*, daŭre eldonos merkatohavajn librojn ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Oni povas helpi nin per pli da libromendoj kaj varbado de anoncoj, precipe ekstermovadaj.

La vojo estas ne ebena, tamen ni ne rezignos niajn klopodojn kaj esperojn por gajni la tutan mondon por Esperanto.

Fine mi kore esperas, ke la nova jaro alportos al ni ĉiujn felicton, pacon kaj brilajn sukcesojn en la movado. ■

\*Ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*





Kapsikoj de nova vario kreita de la spaco (dekstre) kaj la ordinara (maldekstre)

**E**BLAS, ke iun tagon, kiam vi vizitos legomovendejon aŭ superbazon, vi mire rimarkos kukumojn grandajn kiel klabo kaj tomaĵojn grandajn kiel flugpilko. Kaŝante la surprizigon, vi eble ŝercos kun vendistino:

“Ĉu ili venis el alia planedo?”

“Jes, ili estas novaj produktaĵoj kreitaj de la spaco. Bonvolu aĉeti.”

Tiam, vi larĝe malfermos la okulojn probable ne pro ŝia ĉarma rideto.

Fakte, tiun tagon oni ne longe atendas.

En 1987 ĉinaj kosmonaŭtoj faris ordinaran sciencan esploron per ricevebla satelito, en kiun ili metis 10 kg da semoj de legomoj kaj aliaj plantoj. Ŝajnis, ke neniu atendis, ke post kiam tiu satelito revenis sur la teron, komenciĝis nova studo pri semobredado en la spaco.

La plantoj, kies semoj estis breditaj en la spaco, kreskas rapide kaj donas fruktojn grandegajn. Grandnombraj donitaĵoj kredigis la sciencistojn, ke ili trovis rimedon ricevi bonrasajn kulturvariojn. Evidente, tio havas eksterordinaran signifon por Ĉinio, granda agrikultura lando. Ĉar pli kaj pli akriĝas la kontraŭdiro inter multiĝo de loĝantaro kaj reduktiĝo de agroj, altiĝi per sciencoj kaj teknikoj, precipe per nova altteknologio, la produktokvanton de plantoj estas, sendube, plej urĝa tasko por la agrikulturo de Ĉinio. Tial, al tiu aktuala temo ĉinaj sciencistoj donas pli grandan atenton, kiam la aliaj tre malmultaj landoj, kiuj posedas riceveblajn satelitojn, faras esploradon en sia kosmonaŭtika kampo.

Esplorado montras, ke en la spaca medio, ekz.,

sub kosmaj radioj kaj mikrogravito, semoj de plantoj mutacias. Tion sciencistoj nomas mutacio en la spaco. De nekalkuleblaj jaroj la plantoj kreskas sur la tero sub la konstanta gravito. La formo, fiziologiaj ecoj, agoj kaj evoluo de iliaj semoj ĉiam estas reguligataj kaj influataj de gravito, kaj plie la plantoj, kies raso evoluis pli longe, ricevis tian influon pli grandan. Pro la kosma mikrogravito

kaj faktoroj de fizika radiado, ilia heredeco neeviteble estas forte influata kaj aperos eble genetika ŝanĝiĝo malfacile akirebla dum mutacio sur la tero.

De post 1987 ĉinaj sciencistoj, per semoj de plantoj transportitaj de ricevebla satelito kaj aerostato, faris pli ol 300 provojn rilate legomojn kaj grenplantojn. Post provado en pli ol 20 municipoj, provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, pli ol 50 institutoj sukcesis en kulturado de altproduktaj, bonkvalitaj kaj tre imunaj varioj de rizo, tritiko kaj kapsiko.

La novaj varioj bredataj de la spaco donas ne nur dikajn rizomojn kaj tigojn, sed ankaŭ grandajn kaj karnoriĉajn fruktojn kun brila

koloro kaj alta imuneco. Precipe, nepoluitaj, ili estas puraj naturaj verdaj manĝaĵoj kun preskaŭ neniu kemiaĵo. Ĉio tio signifas novan agrikulturan revolucion en kulturado de bonaj varioj.

Sciencistoj devas fari pli multajn provojn por grandaree kulturi novajn variojn de plantoj sur vastaj kampoj de nia terglobo, por ke la manĝaĵoj kreitaj de la spaco vidiĝu sur nia manĝotablo. Iuj antaŭdiris, ke eble en la komenco de la venonta jarcento aŭ iom pli poste pli multaj homoj vidos tiel grandajn legomojn.

# Nutraĵo kreita de la spaco

de LI LIANG



# JUNAJ GEPATROJ

*En la 1-a numero de EPC, 1997, mi estis gasto de la rubriko "Junularo". Nun ĝia redaktorino Suno (Sun Aijun) havas novan okupon, kaj mi transprenis ŝian laboron. La eta ŝanĝiĝo sentigis al mi la forflugon de tempo. Wang Jianbing, kiu diris "Mi plej malŝatas kruelan bokson", nun havas ĉarman filinon. Ĉu vi ankoraŭ memoras la rideton de la filino de Wang Hanping (sur foto de p.4, 1-a n-ro de EPC, 1997)? Nun ŝi feliĉe kreskas ĉe siaj gepatroj. Mia filino baldaŭ havos tri jarojn. Subite mi sentas, ke por ni junuloj, "patriĝo" aŭ "patriniĝo" havas ampleksan signifon. Eble rakonti pri junaj gepatroj, laborantaj en nia redakcio, donos al niaj legantoj novan konon pri la junularo de Ĉinio.*

YU TAO

## "MEJLOŝTONO EN MIA VIVO"

En Ĉinio, antaŭe oni rigardis filon kiel daŭriganton de la familio kaj subtaksis filinon, sed multaj nunaj junuloj jam forigis tian koncepton. La naskiĝo de bebo, ĉu virseksa ĉu insekseksa, estas ĉiam granda ĝojo por nunaj junaj gepatroj.

Jianbing diris: "La naskiĝo de mia filino estas mejloŝtono en mia vivo." Fakte li ne troigis la diron. La naskiĝo de la infano ja multe ŝanĝis lian vivon. Antaŭe kun sia edzino Jianbing ofte vizitis kinon, ĝuis koncerton, babilis longe kun amikoj, legis libron en tuta dimanĉo... Sed nun en lia vivo estas nur laboro kaj flego de la bebo.

Laŭ la ĉina kutimo, en la unua monato post sia akuŝo virino devas esti bone prizorgata. Ŝi ne uzu



Yu Tao, lia edzino kaj ilia filino

malvarman akvon nek suferu venton, sed devas ripozi en lito kaj esti bone nutrata. Same kiel aliaj edzoj, Jianbing devis multe fari. Nokte, kiam la filino ploris, li tuj leviĝis. Por dormigi ŝin, li kantis lulkanton, iris kaj reiris en la ĉambro kun ŝi en la brakoj. Kiam ŝi

endormiĝis, li jam estis tre laca.

Kvankam laca, Jianbing estas tre ĝoja. Li diris, ke la infano perfektigis lian vivon, de fraŭlo, edzo ĝis patro, li iĝis kompleta viro. Nun li havas pli da devosenoj pri la familio.

Wang Hanping patriĝis du jarojn post sia edziĝo. En la unuaj jaroj lia filino estis prizorgata de liaj bogepatroj, loĝantaj en suda Ĉinio. Tiam li ĉiujare kelkfoje iris tien por viziti la filinon, kaj pli ofte telefone aŭdis la dolĉan voĉon de la filino. Nun lia pli-ol-du-jara filino jam venis en Pekinon. Li ne plu suferas pro sopiro pri la filino.

## "BONA PATRINO ESTAS BONA LERNEJO"

Oni diras, ke "bona patrino estas bona lernejo". En Ĉinio, patrino havas pli da influo sur infano ol patro. "Tenera edzino kaj bona patrino" estas tradicia kriterio de




ĉina virino. S-inoj Gao Jingmin (Gaŭ Ĝingmin) kaj Niu Xueqin (Niŭ Ŝjueĉin) laboras en la Distribuata Fako de EPĈ. Ili diligente laboras kaj ankaŭ bone plenumas la devojn de edzino kaj patrino. Ili ambaŭ havas infanojn pli-ol-5-jarajn. Okazis multaj interesaĵoj dum ilia edukado al la infanoj.

En iu tempo, la filino de Gao ofte agis kontraŭ ŝia deziro. Matene Gao urĝis ŝin ellitiĝi kaj vestiĝi, sed ju pli Gao urĝis ŝin, des pli ŝi malrapidiĝis. Anstataŭ riproĉi, Gao laŭdis la filinon: “Vi estas bona infano. Se vi rapide vin vestos, vi atingos la infanĝardenon akurate, kaj ankaŭ la instruisto laŭdos vin.” La infano ĝojiĝis kaj rapidiĝis.

Infanoj ofte faras ion, kio ĉaĝrenas la gepatrojn. Foje la infano de Gao tondis la kolumon de sia vesto kaj diris: “Granda kolumo estas pli komforta.” La filino de Niu dispartigis globkrajonojn por rigardi, kio troviĝas ene. La vesto kaj globkrajonoj senutiliĝis, sed Gao kaj Niu ne simple riproĉis la infanojn. Ili unue aŭskultis la klarigojn de la infanoj kaj poste edukis ilin. La infanoj facile akceptis la admonojn de la patrinoj, kiuj egalrajte kaj demokratie traktis ilin. Ĉinoj nomas la gepatrojn “estroj de la familio”. Tiu titolo estas iom feŭdisma. Antaŭe la gepatroj havis plej altan aŭtoritaton en la familio. Kaj el la agmaniero de Gao kaj Niu ni vidas modernajn kaj egalrajtajn rilatojn inter infanoj kaj la gepatroj.

La filino de Niu estas iom aŭdaca, do Niu diris al ŝi: “Petu permeson de la instruisto kaj gepatroj antaŭ ol fari ion.” La filino de Gao estas iom timema, do Gao ofte kuraĝigis ŝin. Ili tiel edukas la infanojn, kiel Konfuceo instruis siajn disĉiplojn. Nun multaj junaj patrinoj jam konsciis la gravecon kulturigi bonan karakteron de la infanoj.



Wang Jianbing kaj lia filino

### “VI NE KOMPRENAS LA GEPATROJN, ANTAŬ OL HAVI INFANON”

Tiun frazon mi multfoje aŭdis de la maljuna generacio, sed la signifon mi komprenis nur post la naskiĝo de mia filino. Rigardante la novnaskiton, mi ofte demandis mian patrinon pri mia infaneco. Kompare kun mia sperto, mi komprenis la penadon de miaj gepatroj por kreskigi mian fraton kaj min. Tiam ĉiu familio ĝenerale havis du-tri infanojn kaj enspezis malmulte.

Laŭ enketo, 61% de la solinfanaj familioj en ĉinaj urboj elspezas 50-60% de la familia enspezo por sia infano. La amo de junaj gepatroj al sia infano estas pli materiala ol la antaŭaj generacioj. Nia raportistino Shu Mei diris: “Post mia patriniĝo, en magazenoj mi ne plu interesiĝas pri modaj vestoj kaj kosmetikaĵoj, sed nur atentis ludilojn kaj vestojn por infanoj. Se mia filo petas ion, mi ĉiam kontentigas lin.”

Multaj junuloj aprobas la politikon de naskolimigo, ĉar ili povas doni pli da energio kaj mono al la infano. Eĉ se ne estus tiu

politiko, ili mem ne volus pli da infanoj. Kompare kun la antaŭaj generacioj, la junaj gepatroj ne plu zorgas pri tio, ĉu la infano flegos ilin aŭ ne, kiam ili maljuniĝos, sed klopodas por havigi al la infano feliĉan estontecon.

Pro okupiteco multaj junuloj konfidigas la infanon al siaj emeritaj gepatroj. Pri edukado de la infano, la maljunuloj kredas sian sperton, dum la junuloj ofte konsultas librojn pri sciencaj metodoj. Kiam aperas kontraŭdiro, la junuloj ofte cedas, ĉar la maljunuloj diras: “Ni kreskigis vin kaj viajn gefratojn, kial ni ne scias bone prizorgi vian infanon?” Do la junuloj havas nenion por diri.

Ĉiam, kiam ni junaj gepatroj renkontiĝas, ni parolas pri infanoj. La filo de Shu Mei estas pli aĝa ol la bebo de Jianbing, Ŝi promesis donaci al ĝi vestaĵojn, kiuj estas tre belaj kaj uzitaj de ŝia filo nur kelkfoje, sed nun ne taŭgas por li pro malvasteco. Gao kaj Niu ofte parolas kun Hanping kaj mi pri sia sperto en vartado kaj la vivo de siaj filinoj en infanĝardenoj. Amikiĝis, niaj infanoj, kiuj ne havas proprajn gefratojn, tamen multajn amikojn.

# Pri “kabaretoj”

de PANG NAIYING

*Kiun rolon ludas kabaretoj en la ĉina kulturo? Kiel nomiĝas la plej konataj?...*

**ERICH SEIDEMANN** (Germanio)

**E**N sia letero s-ro E. Seidemann demandis pri “kabaretoj”. Ricevinte lian leteron, mi vizitis dekkelkajn restoraciojn en Pekino. Mi opinias, ke tiuj, kiujn mi vizitis, ne estas “kabaretoj” en la vera senco de tiu ĉi vorto. Tio okazis eble pro nia malsama kompreno aŭ pro kulturaj diferencoj origine ekzistantaj en la Oriento kaj Okcidento. Tamen, ni eble povus diri, ke ili estas “ĉinaj kabaretoj”.

Fakte, jam en la antikva Ĉinio ofte okazis, ke literaturistoj kaj precipe poetoj prenis trinkejon aŭ restoracion kiel kunvenejon, kie ili faris versaĵojn kaj pentraĵojn. Antaŭ pli ol 1 700 jaroj Cao Cao, militaristo de la Orienta Han-dinastio, multfoje regalis literaturistojn en Tongquetai. En Ming-dinastio (1368-1644) kaj Qing-dinastio (1644-1911) en suda Ĉinio furoris “bankedo kun poemo-verkado”. Antaŭ la bankedo ĉiu ricevis du skatolojn da manĝaĵoj kaj penikon, tuĉon, paperon kaj tuĉfrotan ŝtonplaton. Ĉe la fino de la bankedo oni devis doni sian versaĵon. Tamen, tio ne estis en fiksita loko.

Kun tempopaso en Pekino aperis manĝejoj kaj trinkejoj kun siaj propraj kulturaj trajtoj. Ekz. Tetrinkejo Laoshe estas destinita por renkontiĝo de artistoj de pekina opero kaj ĝiaj amantoj. Inter la ĉeestantoj ne mankas famaj roluloj de teatraj trupoj kaj ankaŭ emeritoj-amantoj de pekina opero. La lastaj, sidante ĉe kvadrata tablo el palisandro, trinkante teon kaj ĝuante nuksojn kaj kukojn, atente aŭskultas pekinan operon. Pro eminenta prezentado, la spektantoj foje-refoje tondre aplaudas. Ili frekventas la renkontiĝejon, malgraŭ la vintra frostoj kaj somera ardo. Nun ĉiam pli multiĝas la

vizitantoj al la tetrinkejo. Inter la vizitantoj plimultiĝas mezaĝuloj, junuloj kaj eĉ 4-5-jaraj infanoj. Ankaŭ alilokaj komercistoj vizitas la lokon por lernado.

La Restoracion “Abiturientoj en 3 jaroj” ofte vizitas speciala kolektivo, kiu konsistas el mezlernejaj diplomitiĝintoj en 1966-1968. Ili iam laboris en kamparo por sin hardi. Poste ili revenis al urbo. Nun, ili, sidante en dometo el arboŝeloj de la restoracio kaj rigardante plugilojn kaj vipojn uzatajn en tiuj jaroj, prenas simplajn manĝaĵojn, kiaj peklaĵo, maizfaruna kuko kaj bulo el maizfaruno kaj dishakita legomo. Ili kun profunda emocio rememoras la neordinaran vivovoĵon en sia juneo: disiĝo de siaj gepatroj, neniam spertita sufero, unua amo, revo pri la estonta vivo... Ĉio ĉi jam forpasis, tamen estas klara en la memoro. Ili babilas kaj pri la pasinteco kaj pri la estanteco, pri si mem kaj pri siaj infanoj. Al la infanoj, ne spertintaj penigan vivon, mankas kapablo de sendependa vivo, sekve ili kune kun siaj infanoj revizitas la vilaĝon, kie ili pasigis penigajn tagojn...

En Pekino multaj similaj restoracioj kun riĉa kultura enhavo estas entreprenataj kun aparta signifo. Fangshan-restoracio ja estas unu el ili. Ĝi sidas en Beihai-parko, kiu iam estis imperiestra ĝardeno. En la mezo de la 20-aj jaroj kuiristo servinta al imperiestro tie ekfunkciigis restoracion kaj preparis pladojn imite tiujn en la Imperiestra Palaco. “Yilan-halo” de la restoracio estis loko por imperiestro Qianlong (1736-1796 sur la trono) ĝui ondojn. Nun ĉinaj kaj alilandaj turistoj, sate sin amuzinte per drakboato sur la lago, povas ĝui



bongustajn manĝaĵojn de imperiestra familio kun akompano de palaca muziko kaj danco. En Qing-dinastio (1644-1911) la palacaj muziko, danco, kaj kuirarto senprecedence progresis. Tio estas valora heredaĵo. En la pasintaj dekoj da jaroj Fangshan-restoracio faris atenteman esploron kaj nun ĝi povas fari 800 specojn da palacaj pladoj.

Se la restoracia servo rolas en la kultura populariĝo, la klientoj do havas intereson en la manĝado, akiras ian scion kaj precipe la historion en tio. Ekz. prenante kaĉon el nigra rizo, oni povas informiĝi de servisto, ke ĝi estis trovita en la imperiestra receptaro de la Imperiestra Palaco. Siatempe oni ne sciis, kie produktiĝas nigra rizo, sekve oni sendis serĉi tra la lando kaj fine trovis ĝin en Shaanxi-provinco. Nun, tia valora "imperiestra rizo" vendiĝas preskaŭ en ĉiuj grenvendejoj.

Nemalmultaj alilandanoj venintaj al Ĉinio interesiĝas pri manĝaĵoj kaj kuirejoj de ĉinaj imper-

poton, kupran vazon kun tri piedoj kaj feran kaldronon por prepari manĝaĵojn. En suda Ĉinio, kie abundas bambuoj, oni kuiras rizon per bambutubo. En Pekino estas restoracio de dongoj, kie oni kuiras tiamaniere. La donga restoracio estas en domo tegmentita en formo de bova kapo, kaj havas sur muroj apartan freskon kaj skulptitajn maskojn el bambuo. Tie oni povas ĝui belan dong-nacian kanton, kantatan de knabinoj sen akompano. Kantinte, ili donacas al la gastoj po saketon da vanilo, simbolo de bondeziro. Poste ili proponas al gastoj "acidan fiŝsupon" propran al dongoj. Ili konigis, ke dongoj bredas fiŝojn en rizkampo. Kiam rizo maturiĝas, ankaŭ la fiŝoj grasiĝas. Kiam la patrino naskis filinon, ŝi fermentigis vazon da fiŝoj kaj konservis ĝin en hermetika ujo ĝis kiam la filino edziniĝos. Tiam la patrino elprenos ilin kaj faros ilin en formon de hirundo, kio montras, ke la filino fluge forlasos la gepatran domon.



Danco prezentata de dong-aj knabinoj en restoracio en dong-nacia gusto

iestroj. En vizitado ili informiĝis, ke la imperiestroj vivis diboĉan vivon, ĉiu manĝo konsistis el centoj da pladoj, sed ili prenis malmulte, plejparto el ili estis netuŝita. La kuirejo por imperiestra familio nomiĝis "imperiestra kuirejo" kaj tiu por imperiestro kaj lia edzino "interna kuirejo", kiu konsistis el bakujo kaj farejoj de viandaj pladoj, legomaj pladoj, kukoj kaj rizaĵo.

Rostado kredeble estis la plej frua kuirmetodo de homoj. En la kaverna ruino de la pekin-homoj ĉe Zhoukoudian, vivanta antaŭ 500 mil jaroj, oni trovis rostbrunigitan bestoston miksiton kun cin dro. Poste la pekin-homoj faris ŝtonplaton, argilan

La direktorino de la restoracio estis han-nacia instruistino. Konigante la intencon funkciigi la restoracion, ŝi diris, ke dong-nacio havas belan, antikvan kulturon, tamen ĝi vivis en la montoj de la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo. Kaj la originala alkoholaĵo de dongoj fariĝis bone konata, nur kiam oni ĝin tien portis. La restoracio kiel fenestro aprecigas aliajn ne nur per manĝaĵa kulturo, sed ankaŭ per multaj aliaj. Kaj la dongaj knabinoj pere de sia manĝaĵa kulturo ekkonis la eksteran mondon. Nun la restoracio pagas por ilia lernado de administrado, artoj kaj fremdaj lingvoj, por ke ili konstruas hejmvilaĝon estontece. ■

YU TAO:

# Kavalirino kaj ŝia kavaliro

**L**Aŭ la Plena Ilustrita Vortaro (PIV), du el la signifoj de la vorto “kavaliro” estas ricevinto de ordeno kaj nobelo distingiginta per sia galanteco, precipe akompananta sinjorinon.

Je la unua signifo, kompreneble s-ino Nora Moerbeek-Bartels tute meritas esti kavalirino, ĉar pro sia multjara laboro por la Esperantomovado ĝenerala kaj blindula, nacia kaj internacia, la 26-an de aprilo 1996 ŝi ricevis la kvinan gradon de la ordeno Oranje-Nassau de la urbestrino de Beverwijk, Nederlando.

Ŝia edzo, s-ro Rob Moerbeek, estas multjara oficisto de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio. Dank’ al liaj helpo kaj akompano, s-ino Nora ne nur aktivis en la blindula E-movado, sed ankaŭ partoprenis diversajn E-renkontiĝojn. Laŭ mia opinio, li estas vera kavaliro je la dua signifo. Mi konatiĝis kun ili dum la 81-a UK en Prago, kaj en Roterdamo mi havis pli da kontaktoj kun ili kaj intervjuis tiun respektindan paron.

Tuj antaŭ la intervjuo mi diris, ke mi ĝojas paroli kun la kavalirino kaj ŝia kavaliro. Rob respondis modeste: “Mi estas nur kavalirin-edzo.” Mi donis klarigon: “Mi opinias, ke la edzo, kiu bone prizorgas sian edzinon, meritas esti kavaliro.” Rob cedis al mia obstino: “Ho, iom vi pravas, mi estas kavaliro intercitile.” Dum nia parolado s-ino Nora, sidanta ĉe Rob, ridetadis kaj atente aŭskultis. Ni do ekparolis pri ŝia lernado de Esperanto.

Nora rakontis: “Fakte mi jam konatiĝis kun Esperanto, kiam mi estis nur eble 6-jara, ĉar tiam miaj gepatroj hejme parolis Esperante. Tamen mi lernis ĝin en blindul-instituto, kiam mi havis ĉ. 20 jarojn. Poste por pli bone posedi la lingvon mi iris



Nora (dekstre) ordenata de la urbestrino

al universitato en Amsterdamo. (Rob: Tie ŝi el-lernis ĝin.) Kaj mi sukcesis en ekzameno.”

Pri konatiĝo kun Rob, Nora rememoris la emocian pasintaĵon. Tiam Rob transprenis la lekciojn de ŝia docentino kaj ankaŭ la kursanojn. Nora iĝis lia studentino. Ŝi havis problemon por iri al Amsterdamo, kaj Rob decidis helpi ŝin. Tamen je la unua fojo okazis io. Tiam li rigardis ĉu venas aŭtoj, dum ŝi koliziis kun iu ŝtupetaro surkamiona. Nora vundiĝis. Rob sin riproĉis, tamen Nora



montris komprenemon. Ŝi diris al mi: “Tio montras, ke li ne sciis kiel akompani blindulon. Do mi donis al li nederlandan libreton, kiu enhavas sugestojn kion fari kun blinduloj. Tio entuziasmigis lin.” Rob aldonis: “Nia universitata grupo tradukis ĝin al Esperanto, jen kontribuo al la socio.”

Iliaj paroloj harmonie akordiĝis, kio vidigis al mi la amon kaj konkordon inter la geedzoj. Ilia sperto ja montras tion. En lia unua vizito al la hejmo de Nora, Rob vidis pianon, do li komencis alian manieron por akompani ŝin — plane. Poste montriĝis, ke ili havas plurajn komunajn interesojn. Intima kunlaboro iĝis amikeco kaj fine venis amo.

Nora estas sekretario de Ligo Internacia de Blindulaj Esperantistoj (LIBE) kaj redaktoro de ĝia organo “Esperanta Ligilo”. Ĉiutage, krom la LIBE-laboro, Nora faras ankaŭ E-instruadon kaj literaturan tradukadon. Eldoniĝis “Anne Frank ne

du gazetojn eldonatajn de UEA — “Esperanto” kaj “Kontakto”. Li konas multajn lingvojn — Esperanton kaj la nederlandan lingvon li regas, la anglan, francan kaj germanan li lernis en gimnazio, li lernis pasive la helenan, hebrean kaj latinon. Li kaj Nora multe kontribuas al E-edukado, kaj ofte vidiĝas ili ambaŭ en la prelegoj de Internacia Esperanto-Instituto kaj aliaj E-renkontiĝoj. La plej fora E-vojaĝo por ili estas vizito al Ĉinio en 1986.

Estis la 71-a UK en Pekino. Pri la vizito ili ambaŭ kun emocio parolis, kvazaŭ ĝi okazus hieraŭ.

Rob rakontis: “Mi devas diri, ke nia plej bone memorata kongreso estas la 71-a UK en Pekino. Tiam ni havis eĉ la antaŭkongreson, do la plej longa kongreso nia. Mi havas la impreson, ke la ĉina lingvo estas tiel aparta kaj havas nenion komunan kun Esperanto, tamen ni rimarkis ke ĉinoj bone ellernis Esperanton. Eĉ simpla laboristo povas bone paroli. Mi vidis la stratan vivon. Te-vendistino surstrata simple donacis teon al fremdaj gastoj, tio kortuŝis nin. Ni havis vere pozitivan sperton kun la lando kaj la popolo.”


Nora aldonis: “Reveninte el Ĉinio, ni havas 56 adresojn, kun iuj ĉinoj ni ankoraŭ korespondas. Poste ni havis tri gastojn ĉinajn en nia hejmo. Ni havis grandan respekton al la ĉina civilizacio, al Konfuceo kaj Laozi kaj admiron al la konstruaĵoj antikvaj... kaj la Granda Muro kompreneble. Sur la muro ni sentis nin heroj.”

Ili menciis amikiĝon kun s-ro Dai Song'en kaj lia edzino Xue Meixian en Roterdamo. Mi diris: “Dai estas mia ĉefo, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicĉefredaktoro de EPĈ. Sino Xue instruis al mi Esperanton en Pekina Radio-Instituto.” Rob kaj Nora petis min transdoni iliajn salutojn al Dai kaj Xue.

Nora kaj Rob estas fidelaj aŭskultantoj de E-programoj de Ĉina Radio Internacia, ankaŭ fervoraj legantoj de EPĈ.

Mi petis iliajn proponojn kaj sugestojn. Rob diris: “La tre belaj ilustraĵoj estas tute taŭgaj eĉ por ekspozicio. La paĝoj por komencantoj estas ankaŭ spritaj. Mi aparte ŝatas kontribuadojn pri la ĉina literaturo.” Nora aparte interesiĝas pri la Silka Vojo.

Nun alia traduko de Nora “Taglibro de Anne Frank” jam estas preta, kaj ŝi daŭre aktivas en instruado kaj tradukado. Rob diligentas en la CO. Eble vi vidos ilin ambaŭ iam dum iu E-renkontiĝo. ■




Rob (maldekstre) kaj Nora (meze)

estas de hieraŭ” tradukita de ŝi. Tage s-ro Rob laboras en la CO de UEA, dum Nora aŭskultas sonbendojn pri E-legaĵoj. Kiam aperas nova numero de “Esperanto”, Rob petas la CO-anojn laŭtlegi kaj surbendigi ĝian enhavon, tiel ankaŭ Nora povas ĝui la gazeton. Por pli multe helpi Nora, Rob lernis brajlon, tamen li foje eraris, ekz. li skribis “la knabo havas 13 harojn” anstataŭ “la knabo havas 13 jarojn”. En rememoro pri tio, ili ankoraŭ ridegis.

Rob estas “promenanta PIV”, kiu provlegas la

# *Du nubetoj*

de FENG DAQING<sup>1</sup>



Feng Daqing

*Jen sunbrile pluveroj gutas  
Eble du nubetoj kun ĝojo  
Rerenkonte larme salutas  
Post vojaĝo de longa vojo*

*Baldaŭ poste pluvetas susure  
Certe la du nubetoj ploras  
Pro tuja disiro malplezure  
Ĉar ambaŭ nevole dissoras*

*Ankaŭ mi estu nubet' bela  
Migrante en la atmosfero  
Kie estas mondo fabela  
Kaj songolando de la tero*

*Mi veturos sur milda vento  
Al alia blanka nubeto  
Nur por ĝojoplena momento  
Dum duopa nub-menueto*



Lu Jixin

# Asta<sup>2</sup>

de LU JIXIN<sup>3</sup>

*Ni ekkonatiĝis kun varm' en la tag',  
La koro subnaĝis en vin' la gasta,  
La koro subnaĝis en vin-lag',  
Asta!*

*Prezente Svedion, por plia penetr',  
Parolis jen vi delikate drasta,  
Parolis jen vi sur la katedr',  
Asta!*

*Post pluvo, ni borde sub suna oblikv',  
Spektis belon de fluo lanti kvasta,  
Spektis belon de fluo — l' antikv',  
Asta!*

*En babilado pri la moro kaj ŝongl',  
Aŭdiĝis de vi la rida ton' drasta,  
Aŭdiĝis de ni la rida tondr',  
Asta!*

*Sunlumo, zefiro ĉirkaŭ dialog',  
Ekĉarmis min kora petalo gasta,  
Ekĉarmis vin kora peta log'?  
Asta!*

*Temante pri verda esper' kaj kultiv',  
Mi trovis jam la sinon de vi, vasta;  
Ni trovis jam la sinon de viv',  
Asta!*

*Mallonga semajno, ja strofo, petal'.  
Venis ĉirkaŭbrako la fina, lasta.  
Venis ĉirkaŭbrako, la final'?'  
Asta!*

*Vespero en grizo, folioj en flirt',  
Altflugis vi kiel birdo hasta.  
Altflugas vi kiel bird'?' oh,  
Asta!*

*Ofte okulumas la memora stel'.  
Ankoraŭ nin ligas mano elasta.  
Ankoraŭ min ligas mano el  
Asta!*

---

1. Feng Daqing naskiĝis en 1952 en Ŝanhajo. Nun li estas instruisto de kolegio (Adreso: Huangshan Linye Xuexiao, Tunxi, Anhui, CN-245041, Ĉinio). Liaj versaĵoj estis aperigitaj en Juna Amiko.

2. Asta estas sveda esperantistino, kiu iam vizitis Guilin.

3. Lu Jixin naskiĝis en 1953 en Guilin de Guangxi. Li verkis kaj tradukis multajn Esperantajn poemojn. Li ankaŭ studis tradukadon kaj verkadon de E-poemoj.



## Libroj ricevitaj de "El Popola Ĉinio" kaj Ĉina Esperanto-Biblioteko (I)



**Ni ludas por... lerni** (du kajeroj) Alessandra Di Donato (Italio), Itala Sekcio de ILEI 1995, 87 p. + 98 p. 17.50 x 25 cm. Interesa infanlibreto kun desegnoj helpas infanetojn ĉiutage lerni simplajn Esp. vortojn kaj paroligas ilin en Esp. Mendu ĉe Itala Sekcio de ILEI: Via Villoresi, 38, 24143 Milano. Donacis iu al nia redaktoro dum la 81-a UK.

**Verdaj Donkiĥotoj** Julio Baghy. Pro Esperanto (Aŭstrio), 1996. 175 p. 23 cm. Donacis Nakayama Kinzi (Japanio).

**Utaaro de Takuboku** trad. Miyamoto Masao el la japana. L' Omnibuso (Japanio), 1980 (2-a eld.) 121 p. 16.50 cm. Donacis Nakayama Kinzi.

**Ellernu!** Ferenc Szilagy. Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Brazilo), 1968. 122 p. 23 cm. Ilus. Progresiva kurso de Esperanto. Donacis Nakayama Kinzi.

**Gramatika demandaro resuma** Julio Baghy. Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 48 p. 20.50 cm. Donacis Nakayama Kinzi.

**L' Omnibuso kun la tri pasaĝeroj** Miyamoto Masao, Ueyama Masao kaj Saito Ezo. L' Omnibuso (Japanio), 1980. 65 p. 18 cm. Ilus. Donacis Nakayama Kinzi.

**Trarigardo kaj mallonga priskribo de la kulturhistoriaj monumentoj sur la teritorio de komunumo Prilep** Trad. Nikola Uzunov el la makedona. Prilep (Makedonio), 1996. 64 P. 24 cm. Ilus. Donacis Biblioteko de E-societo "La Progreso" (Makedonio).

**La nova realismo** (en Esperanto). Bruno Vogelmann. Trad. la aŭtoro el la germana. Flandra Esperanto-Ligo, 1989. 186 p. 21 cm. "La konsekvenco de la Nova Pensado": argumentoj por mondkoncepto bazita sur respekto al la vivo kaj al la homa racio. Mendebila ĉe la eldonejo aŭ UEA. Donacis Bruno Vogelmann (Germanio).

S-ro Bruno Vogelmann donacis la samtitolan libron ankaŭ en la lingvoj albana, angla, bulgara, ĉina, ĉeĥa, franca, germana, itala, mongola, pola,

rumana, rusa kaj serba.

**Taglibro de Anne Frank** Trad. Nora Bartels el la nederlanda. Libroteko Tokio (Japanio), 1997. 300 p. 21cm. Ilus. Mendebila ĉe Libroteko Tokio. Donacis Libroteko Tokio.

**Koreaj malnovaj rakontoj** Komp. kaj trad. Cho Sung Ho. Korea Esperanto-Asocio, 1997. 98 p. 22.50 cm Ilus. Mendebila ĉe Korea Esperanto-Asocio. Donacis Cho Sung Ho.

**La bildstria gvido al genetiko** Trad. Cho Sung Ho el la angla. Librejo Akademio (Korea Respubliko), 1996. 216 p. 22.50 cm. Ilus. Mendebila ĉe Korea Esperanto-Asocio. Donacis Cho Sung Ho.

**La ŝtona testamento** Reino Eriksson. Kuopio (Finnlando), 1981. 112 p. 21 cm. Poemoj en la finna kaj Esperanto. Donacis Reino Eriksson.

**Lulkanto al tempo turmentata** Reino Eriksson. Iisalmi (Finnlando), 1984. 100 p. 14.50 cm. Ilus. Poemoj en la finna kaj Esperanto. Donacis Reino Eriksson.

**Floroj de herbejo** Reino Eriksson. Iisalmi (Finnlando), 1991. 46 p. 21 cm. Kolorilus. Poemoj en la finna kaj Esperanto. Donacis Reino Eriksson.

**Monumente pri Esperanto** Hugo Rollinger. Red. Thomas Bormann. Universala Esperanto-Asocio (UEA), 1997. 112 p. 23.50 cm. Ilus. Dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj de la 5 kontinentoj. Mendebila ĉe UEA. Donacis UEA.

**Nokto de la galaksia fervojo** Trad. Konisi Gaku el la japana. Japana Esperanta Librokooperativo, 1994. 106 p. 26 cm. 5 fabeloj de Miyazawa Kenzi kun fantazia aspekto. Mendebila ĉe Japana Esperanta Librokooperativo. Donacis Takeuti Yosikazu (Japanio).

**Ĉu vi scias ke...** Sergio Docal Puig. Plantation (Usono), 1991. 32 p. 22 cm. Faktoj kaj anekdotoj kontraŭ fumado. Donacis C.A. Shrives (Britio).

**Koran dankon al ĉiuj donacintoj!**

# Lumigi vojon por aliaj

de CHEN ZHAOCHI

**L**A malnova ĥumuraĵo “Blindulo lumigas vojon per lanterno” aludas, ke oni traktas aferojn sen pripensado. Sed lastatempe mi ĝuis novan klarigon de mia amiko:

Iu blindulo ĉiam portas kun si brilan lanternon, piedirante en nokto. Kun scivolemo oni demandis lin:

“Kial vi, nevidanto, lumigas la vojon per lanterno?”


“Tute simpla estas la kialo,” respondis la blindulo. “Tion mi faras ne por mi, sed por ke aliaj bone vidu min kaj ne koliziu kun mi. Tiel, mi garantias al mi la sekurecon kaj helpas min mem.”

Foje, tion mi rakontis al alia amiko, veturante per lia aŭto. Tiu amiko havis saman opinion kiel la blindulo kaj rakontis al mi sian propran travivaĵon:

“Antaŭe, kiam mi veturigis mian aŭton tra tunelo, mi neniam lumigis la lampojn de la aŭto, ĉar la tunelo estas ne tiel longa, kaj krome, sufiĉe hela. Do, mi opiniis, ke ne necesas lumigi la lampojn. Sed ne atendite, iun tagon kamiono veturanta renkonte al mi albatigis al mia aŭto, kaj mi preskaŭ perdis la vivon en tiu akcidento. Poste mi komprenis, ke mi lumigas la lampojn, por ke aliaj bone vidu min. Ĉar kiam mi trapasas la tunelon, mi tro-

viĝas en la loko malhela. Kaj aliaj, kiuj ĵus eniras en la tunelon malhelan, ne povas tuj akomodiĝi al la mallumo. Sen lumigi la lampojn povas okazi akcidento.”

Sur la longa vivovojo estas diversaj aferoj. Se vi ofte helpas kaj prizorgas aliajn kiel la blindulo, vi ĉiam estas helpata. ■



## ĈINIO

● La unuan tagdekon de aŭgusto lastjare 33 esperantistoj de Koreio kaj Ĉinio (de Pekino, Tianjin kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio) partoprenis la aktivadon de somera semajno sur la stepo de la Interna Mongolio. Ili vojaĝis sur la stepo preskaŭ 1 000 km, vizitis multajn vidindaĵojn kaj spertis lokajn naciajn morojn. (Chi Tienan)

● Aŭguste de 1997 la Zaozhuang-a Esperanto-Asocio de Shandong-provinco festis sian 10-jariĝon. Por tio la asocio okazigis konkurson de scioj pri Esperanto kaj ekspozicion de fotoj pri Esperanto, kun la urba poŝtmarka kompanio emisiis memorigan koverton kaj kun la urba televida stacio faris la televidfilmon "Esperanto en Zaozhuang". La asocio elektis Cao Wenxing, prezidanton de la Scienca kaj Teknika Komisiono de Zaozhuang, kiel sian prezidanton. (Liu Yanchun)

● La 6-a Internacia Akademia Konferenco de Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazos en Pekino en la 19-25-a de aŭgusto, 1998. Ĝia temo estas "Iri al la 21-a jarcento: per scienco kaj tekniko disvolvi ekonomion". Dum la kongreso oni faros prelegojn, diskutos gravajn sciencajn problemojn kaj prezentos sciencajn fruktojn. Samtempe okazos la 2-a Internacia Esperanta Somera Semajno por Geknaboj kaj Gejunuloj, dum la somera semajno geknaboj faros pentradon kaj prezentos kanton kaj dancon, kaj la elstarantoj estos premiitaj.

● En 1997 la Esperantlingva Verkista Asocio akceptis 16 membrojn, inter kiuj estis ĉinaj esperantistoj Mao Zifu, Lu Jixin kaj Shi Chengtai.

## BELGIO

● En marto 1998 okazos en Gent "Eduka" borsio. Ĝi celas la instruistaron de Flandrio. Flandra Esperanto-Ligo (FEL) intencas partopreni kaj bezonas informojn kaj interesajn aktualajn fotojn aŭ diapozitivojn pri kiel eble plej diversaj Esperanto-infanaranĝoj (kun minimuma klarigo). Geinstruistoj esperantistaj, kiuj deziras komenci korespondadon kun lerneja klaso en Belgio (Flandrio), bonvolu anonci sin kiel eble plej frue, ĉar ni intencas lanĉi kampanjon por stimuli tian korespondadon helpe de esperantistaj tradukantoj. Tio nur eblas, se ni povas proponi ampleksan liston de lernejadresoj el la plej diversaj partoj de la mondo. Bonvolu sendi materialon kaj informojn al sekcio de FEL: La Progreso, Peter Benoitlaan 117 B 9050 Gentbrugge Belgio. (Katja Lodor)

## FRANCIO

● Kooperativo de Literatura Foiro restarigis la premion "La Verko de la Jaro" por originalaj

beletraĵoj, kiu estis atribuita sesfoje inter 1976 kaj 1987. Ĝi voĉdone atribuos la premion ĉiujare, alterne al poeziaj kaj prozaj verkoj, abonantoj de Literatura Foiro, al titoloj proponitaj de almenaŭ tri membroj de Esperanta PEN-Centro. La premiado okazos en Internacia Literatura Forumo, ĉiusomera aranĝo de L.F.-koop. (Vilain-de Wolf Mari-Roza)

## RUSIO

● La 26-an de julio 1997 en Vladivostoko okazis la festo, dediĉita al 110-jariĝo de Esperanto. Pli ol 40 partoprenantoj, inter kiuj estis gastoj el aliaj urboj de Fora Oriento, aŭskultis prelegon de Aleksandr Titajev pri Ludoviko Zamenhof kaj la mondskala Esperanto-movado. Aparte estis menciita la eminenta rolo de Fedor Postnikov kaj Vladimir Neupokoev en starigo kaj evoluigo de la movado en Fora Oriento de Rusio en la fino de la pasinta kaj en la komenco de la nuna jarcentoj. La 22-26-an de aprilo 1998 okazos la Scienca-Teknika Konferenco kaj funkcios la sekcio "Esperanto en Scienco kaj Tekniko". La 1-6-an de julio estos planita Junulara Renkontiĝo "Vladivostokaj Esperanto-Tagoj" (JRVET' 98). Bonvenon al Vladivostoko! (Aleksandr Titajev)

## UKRAINIO

● Antaŭ nelonge en malgranda loĝloko Irpinj rande de la ukrainia ĉefurbo Kievo pasis vica Internacia Kongreso de LIBE (IKBE-63) kun la ĉeftemo "Esperanto — ĉu integriĝo aŭ izoligo?". Dum semajno ĉ.100 partoprenintoj el 13 landoj pridiskutis siajn problemojn, problemon de LIBE, kaj aŭskultis interesan prelegon pri itala komponisto Giuseppe Verdi, multnombrajn koncertojn prezentantajn ĉefe ukrainian nacian kulturon. (Dmitrij Cibulevskij)



Finna s-anino Saliko (la dua de dekstre) en Murmansk, Rusio



**L**A monto Wutai kuŝas en nordoriento de Wutai-gubernio, Shanxi-provinco. En somero ĝi kun meza temperaturo de ĉ. 20 °C estas ideala somerumejo. Dank' al la temploj dissemnitaj sur la monto kaj grava pozicio en la ĉina budhisma rondo, ĝi ĝuas grandan famon en Ĉinio. Kiel unu el la kvar famaj budhismaj montoj de Ĉinio, ĝi estas sankta por sennombraj piuloj.

Wutai-monto ricevis la nomon pro siaj kvin terase ebenaj montpintoj (*Wutai* signifas ĉinlingve kvin terasojn). La pejzaĝo de Wutai-monto estas impona, precipe tiu de la kvin terasoj. Sur la Orienta Teraso estas Wanghai-templo, kie oni povas rigardi sunleviĝon. Frumatene, kiam la suno leviĝas ĉe la horizonto, la senlima nubaro ruliĝas kaj de tempo al tempo videblas mistera "aŭreolo". En la suno vaporo en la aero formas buntajn lumringojn, kiuj enprenas en sin la siluetojn de rigardantoj kaj vidigas ilin en la nubaro. Sur la Okcidenta Teraso Falei-templo staras inter nuboj. Sur la Suda Teraso staras Puji(Puĝji)-templo kaj buntas sovaĝaj floroj. La Norda Teraso, 3 058 metrojn super la marnivelo, estas la plej alta el la kvin terasoj de Wutai-monto. La vetero estas ŝanĝiĝema inter la teraso kaj montpiedo. Ofte okazas: Kiam sur la teraso brilas la suno, ĉe la montpiedo jam ruliĝas nubaro, tondradas kaj pluvegas; kiam la teraso kovriĝas de nigra nubaro, ĉe la montpiedo brilas la suno. Sur la ebena Centra Teraso majestas Yanjiao(Janĝjau)-templo, ĉirkaŭita de verdaĵoj, ĉarmas fontoj kaj akvofaloj kaj ondas nuboj.

Rigardate de malproksime, Wutai-monto as-

pektas kiel manplato kun la kvin suprenlevitaj fingroj. Laŭ legendo, ili simbolas kvin saĝojn de bodisatvo Manjusri. Budaanoj diris, ke Manjusri iam tie predikis budhismon.


En 58-76 oni starigis templojn sur Wutai-monto kaj en Tang-dinastio (618-907) la nombro de budhismaj temploj jam atingis 360, kaj

nun konserviĝas tie 47 temploj konstruitaj en diversaj dinastioj ekde Tang. Ili estas konataj kiel trezorejo de arkitekturo de la antikva Ĉinio. En 1257 eminenta tibeta bonzo Basiba venis al Wutai-monto por pie viziti Manjusri kaj lamaismo enkondukiĝis en la lokon. Ĝi atingis la kulminon de sia disvolviĝo en 1662-1796 kaj kune ekzistis la hana kaj tibeta budhismoj.

Ekde Tang-dinastio ĉiujare en la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro oni okazigis sur Wutai-monto unumonatan budhisman aktivadon, kiu altiris al si sennombrajn pilgrimantojn kaj turistojn kaj famiĝis en norda Ĉinio. Dum la aktivado ĉiuj temploj pendigas flagojn kaj bruligas kandelojn, kaj bonodoras incensfumo. Ĉiuj bonzoj, portante sur si frokon kaj ludante budhisman muzikon, partoprenis en diversaj budhismaj aktivadoj. Multaj lamaoj, maskitaj kiel feoj, dancis dancon por ekzerci demonojn. Tiam la kunveno atingis sian kulminon, ankaŭ la pilgrimantoj kaj turistoj dronis en

granda ĝojo.

Oni okazigis la aktivadon "Internacia Turisma Monato" en julio kaj aŭgusto ĉiujare en la pitoreskejo de Wutai-monto. Ĝis nun tio okazis 8-foje. Kaj ankaŭ la Montgrimpa Festivalo ĉiujare interesas multajn montgrimpistojn. ■




La inaŭguro de la aktivado "Internacia Turisma Monato"

# Turisma vidindejo Wutai-monto

de LU DONG



Arkado en Longquan-templo



Wuliang-halo en Xiantong-templo (1368-1644)





1. Statuo de bodisatvo Manjusri en Shuxiang-templo
2. Sunleviĝo ĉe la Orienta Teraso
3. La Orienta Halo de Foguang-templo (608-907)
4. Templaro en Taihuai

1	2
	3
4	





# Grupiĝo de ĉinaj entreprenoj

de JI PING

**L**A jara ŝtala produktokvanto de Ĉinio estas 100 milionoj da tunoj. Kvankam Ĉinio estas grava ŝtala lando, tamen neniu el ĝiaj ŝtalaj kompanioj okupas rimarkindan lokon en la listo de famaj ŝtalaj entreprenoj de la mondo, ĉar iliaj produktaĵoj estas malfortaj en konkurenco iaflanke kun tiuj de alilandaj entreprenoj. La Bao-shan-a Ŝtala Kompanio de Ŝanhajo estas la plej granda ŝtala entreprenoj en Ĉinio, sed la de ĝi produktita stano ne estas taŭga por fari facile malfermeblan skatolon, kvankam taŭga por fari skatolojn de biskvitoj kaj teo. La simila stato estas vaste vidata en la ŝtataj entreprenoj de Ĉinio. Ĝuste pro tio Ĉinio ankoraŭ ne okupas frapantan lokon en la internacia ŝtala merkato kaj ĝiaj multaj entreprenoj havas grandajn malfacilojn dum konkuren-


fabrikoj de Ĉinio. La de ĝi produktitaj kamionoj kun marko "Jiefang" (Ĝjefang) kaj personaŭtoj kun marko "Hongqi" (Hongĉji) estas famaj tra la tuta lando. Ekde 1992 la fabriko aneksis 25 aŭtofabrikojn, kio multe pliigis ĝiajn fortojn kaj dank' al tio la fabriko fariĝis la plej granda produktejo de mez-grandaj, leĝeraj kaj personaj aŭtoj en Ĉinio.

Kvankam la Ĝenerala Petrol-kemia Kompanio Yangzi kaj Unuigita Kemi-fibra Industria Kompanio Yizheng k.a. situas en sama regiono, tamen ilin gvidis malsamaj departementoj antaŭe. Por rompi la dispozicion malfavoran al la produktado, aŭtune de 1997 la tieaj 4 entreprenoj unuigis sin en grandan ole-kemian industrian kompanion (grupon) kun totala kapitalo de 54 miliardoj da juanoj. La jara produktokvanto de oleo, kemia sterko

kaj poliestero de la grupo okupas la unuan lokon en Ĉinio.

Estas ankoraŭ multaj aliaj entreprenoj, kiuj suriris la vojon de grupiĝo, inter kiuj estas Haier de Qingdao (Ĉingdaŭ). Tiu ĉi entreprenoj, kiu antaŭe produktis ĉefe fridujojn, aneksis dekelkajn entreprenojn en kelkaj jaroj kaj ĝiaj varoj nun vendiĝas en pli ol 40 landoj. La entreprenoj de aŭtomataj lavmaŝinoj kun marko "Cigneto" de la urbo Wuxi, Jiangsu-provinco, estas la plej granda fabriko de la samtipaj lavmaŝinoj kaj ĝiaj produktaĵoj vendiĝas en pli ol 30 landoj. La koloraj televidiloj kun marko "Changhong" produktitaj en la urbo Mianyang, Sichuan-provinco, fariĝis la plej famaj tra la tuta lando kaj havas grandan debiton en la ĉina merkato. Kaj per tio Changhong komplete frakasis la sonĝon de iuj alilandaj entreprenoj "bankrotigi Changhong en 5 jaroj".

La ĉina ekonomio ĉe la turniĝo de la 20-a al la 21-a jarcento bezonas novan aranĝon, dum la disvolviĝo de ekonomio kaj profundiĝo de la reformado de Ĉinio liveris bonajn ŝancojn por refoja aranĝo de kapitaloj kaj produktoj de la entreprenoj. La grupiĝo de la ĉinaj entreprenoj eniros en novan etapon. ■



En la Ĝenerala Petrol-kemia Kompanio Yanshan

co en la enlanda merkato.

Tial por pliigi la skalon de la entreprenoj kaj konkurencemon estas nepre necese grupigi la industriajn kompaniojn.

La Unua Aŭtofabriko de Changchun, nordorienta Ĉinio, estas unu el la plej frue fonditaj aŭto-



Guo Qibao

# Arbarizi kalvajn montojn

de ZHENG ZHENJIE

**J**UNA kamparano Guo Qibao (Gǔo Ĉjibaǔ) arbarizis kalvajn montojn kaj akiris rimarkindajn sukcesojn.

En 1992 li luis 800 hektarojn da kalvaj montoj por 100 jaroj ĉe ŝtata departemento. La montoj estas en Huanghaoliang de Lüliang-montaro, Shanxi-provinco. Lia faro estis kreiva siatempe ne nur en la provinco, sed ankaŭ en la tuta lando.

Vintre de 1992, Guo adiaŭis sian edzinon kaj direktis sin al la luitaj montoj, portante ŝpaton kaj multe da libroj pri arbarizado. Tage li observis la montojn kaj vespere cerbumis pri arbarizado. Poste li dungis 30 kamparanojn por kune kun ili arbarizi la lokon.

De tiam forpasis 5 jaroj. Kiam mi atingis la lokon antaŭ nelonge, mi vidis, ke sur la montodeklivoj prosperas ĉinaj pinoj, larikoj, soforoj, persikarboj, pirarboj, pomarboj, abrikotarboj k.a. Kvankam iuj arboj estas tre maldikaj, tamen ili estas ombraj kaj tre plaĉas al la turistoj. Guo diris al mi, ke en la pasintaj 5 jaroj li konstruis vojojn sur la montoj kaj arbarizis ĉ. 340 hektarojn sur 14 montoj. 85% el liaj plantitaj arbidoj nun bone vivas. Sur 140 hektaroj la fruktarboj donos fruktojn post nelonge. Li ekspluatis ankaŭ 30 hektarojn da tero por kulturi maizon, milion, fazeolojn kaj diversajn legomojn.

Guo diris, ke nun li preparas sin por konduki akvon kaj elektron sur la montojn. Li planas kon-

strui cisternon por bredi fiŝojn, ŝanĝi la sekajn kampojn ĉe la montoj en rizkampojn, konstrui stalojn de bovoj, porkoj kaj kunikloj kaj entrepreni gren-prilaboradon. La realiĝo de lia plano estos utila ankaŭ al batalo kontraŭ la natura erozio de la loko kaj Huanghaoliang estos komplete kovrita de verdaĵoj. Tie bonodoros fruktarboj kaj sur la montodeklivoj kreskos diversaj grenoj. ■

## KURANTAJ AFEROJ

● Ĉinio komencis konstrui modernan aŭtovojon en la 80-aj jaroj kaj en la fino de 1996 ĝiaj aŭtovojoj longis 3 422 km, kiuj etendiĝas en Pekino, Tianjin, Ŝanhajo, Shandong, Liaoning, Guangdong kaj aliaj lokoj.


● Antaŭ nelonge estis transportita en Ĉinion la unua ŝipo da oleo, produktita de la Ĉina Petrol-naturgasa Kompanio en alia lando.

En 1992 la nomita kompanio komencis fari prospektoradon kaj provekspluatadon de petrolo en Peruo, Kanado kaj aliaj landoj. De 1996 ĝi kontraktis pri petrol-ekspluato kun Sudano, Venezuelo, Kazahstano k.a. Samtempe kun tio Ĉinio malfermis ankaŭ sian propran olean merkaton kaj nun 21 ĉinaj provincoj kaj municipoj malfermis sin al alilandaj petrol-kompanioj.


● Ĉinaj sciencistoj sukcesis fari roboton, kiu kapablas labori sub akvosurfaco je 6 000 metroj, kaj per ĝi plenumis enketon pri la naturaj riĉaĵoj en la pacifika fundo antaŭ nelonge kaj akiris rimarkindan kvanton da donitaĵoj kaj materialoj pri la mara fundo. La roboto, simila al subakva ŝipo, povas aŭtomate eviti la subakvajn obstaklojn kaj esplori la misterojn de la mara fundo tute sen kablo por kontakti sin kun la ŝipo sur la akvo.

● Omaĝe al la evento, ke Hongkong revenis al la patrolando, Jingdezhen (Ĝingdeĝen), porcelana urbo de Ĉinio, faris kompletan da elegantaj porcelanaj manĝiloj kun rozkoloraj floroj (bauhinio) sur ili por soleni ĝin. La bauhinioj, regiona floro de Hongkong, sur la cent manĝiloj estas desegnitaj per roza koloro. Ili prezentas la tradiciajn trajtojn de la porcelanaĵoj de Jingdezhen "blankaj kiel jado, brilaj kiel spegulo, maldikaj kiel papero kaj sonantaj kiel muzikilo" kaj elspiras modernajn trajtojn de la metiartaĵoj, t.e., formoj novaj, linioj elstaraj kaj koloroj klaraj. Nun tiu kompleto da porcelanaĵoj kun la plej alta nivelo de la moderna ĉina porcelanaĵa arto estas konservata de la Ĉina Historia Muzeo.

# La mai de cinaj



Peza ŝarĝo (Turkio) Foto de GUAN ZONGSHAN



Eduko (Usono) Foto de LI XINMIN



Superŝarĝo (Pakistano)  
Foto de LI YOUQUN



# vido en la okuloj diplomatoj



Persa junulino (Irano)  
Foto de SUN WEIDE



Skulptado (Tanzanio) Foto de WANG XIUYING

En la pasinta jaro okazis en la Ĉina Belarta Domo en Pekino ekspozicio de 420 fotoj de ĉinaj diplomatoj, kiuj dum sia feriado kaptis en sian fotilon ion interesan en aliaj landoj. Inter la eksponataj fotoj iuj temas pri ĉiutaga vivo, aliaj pri belaj vidindaĵoj kaj triaj pri moroj kaj kutimoj de diversaj nacioj. Por kontentigi niajn legantojn ni montras kelkajn el ili.



Familio (Nov-Zelando) Foto de LUO XIAOHONG



# Popolmuzika festivalo en Finnlando

de SALIKO (Finnlando)

**D**E tridek jaroj okazas en Kaustinen, okcidenta Finnlando, festivalo, kies frapfrazo en 1997 estis “de vilaĝa festo en mondvilaĝon”. Tio signifas, ke origine la evento estis nur modesta loka festeto kun tradiciaj hejmlandaj muziko kaj dancoj, sed nun ĝi jam fariĝis grandega internacia allogaĵo, kiu daŭras pli ol unu semajnon kaj en kiu prezentas sin dekoj da famaj eksterlandaj trupoj kaj muzikistoj kun siaj pli-malpli ekzotikaj instrumentoj kaj vestaĵoj, aldone al ĉirkaŭ 350 finnlandaj ensembloj, amatoroj kaj artistoj en naciaj, regionaj aŭ mem desegnitaj kostumoj.

En 1997 furoris ekzemple Gansu-a etna artotrupo, fondita en 1950 en nordokcidenta Ĉinio por reprezenti ĉinajn minoritatojn. La trupo kon-

sistas el 7 muzikistoj, 7 kantistoj kaj 16 dancistoj. La festivalo en Kaustinen estis la unua, kie ĉi tiu trupo prezentis sian arton ekster Ĉinio. Oni aranĝis ankaŭ “Ĉinan Vesperon” kun manĝaĵoj, kies biletoj rapide elĉerpiĝis.

Aliajn tre ŝatatajn programerojn prezentis ekzemple multnombra afrika grupo preskaŭ akrobata el Gvineo, fondita en Parizo en 1952. La publiko tre admiris iliajn forton kaj lertecon. Estas bone, ke ni vidas kaj aŭdas eksterlandajn prezentaĵojn kaj tiel

konatiĝas kun la homo kaj la kulturo pli internacie.

Ni vidis dancojn kaj aŭdis muzikon el Kanado, Hungario, Slovakio, Germanio, Danlando, Usono, Irlando kaj kompreneble el diversaj partoj de finningva kaj svedlingva Finnlando. La muziko de la svedlingvaj finnlandanoj estas iom pli rapida, gaja kaj malpeza ol tiu en la finningvaj regionoj. La ensembloj ofte elektas por si iun amuzan nomon. De Kanado venis “Ridetanta Boto”, de Finnlando “Ŝuistidoj” kaj “Prenitetoj”, sed ofte maleblas kapti la humuron per traduko.

Ĉiutage la programo daŭris de la 10-a matene ĝis aŭ post la noktomezo, sed en julio la nokto ne malheliĝas en Finnlando kaj multaj homoj senlace dancadis kaj amuzis sin ĝis mateno.

Nacia danco



# En urbeto, iama fortreso

Teksto de GUANYEXUN

Fotoj de LIUSIGONG

**P**LUVETIS tiun tagon, kiam mi atingis la urbeton, iaman fortreson. Nebula pluveto vualis la montojn ĉirkaŭ la urbeton, malnovajn domojn kaj profundajn stratojn en ĝi.

Infanoj kun granda ombrelo gaje marŝis sur mallarĝa strato. En la urbeto ĉiuj stratoj kun belaj mozaikoj estis pavimitaj el rulŝtonetoj. En pluveto tiuj ŝtonetoj bunte brilis. Laŭdire, la stratoj, kiujn la lokanoj nomas Floraj Stratoj, estis konstruitaj de du ŝtontajlistoj. La Floraj Stratoj aldonis elegantecon kaj romantikecon al tiu antikva fortreso.

La urbeto portas la nomon Fuchuan. Ĝi estis konstruita en la jaro 1500 en orienta Guangxi, suda Ĉinio. Ĝiaj dikaj kaj altaj muroj el grizaj ŝtonoj, grandaj pordoj tegitaj per lado kaj alte starantaj gvatturoj, ĉiuj estas bone konservitaj. Antaŭe, loĝis en ĝi nur garnizono kaj plutokratoj, sed nun — ordinaraĵoj. Tamen, ambaŭflanke de la Floraj Stratoj la antikvaj loĝdomoj kun belaj gravuraĵoj sur la pordoj kaj fenestroj ankoraŭ montras la majestecon de la potencaj familioj. En iliaj ĝardenoj staras antikvaj arboj, aromas diversaj floroj, delikatas artefaritaj montetoj, kvietas fiŝlagetoj kaj aŭdiĝas de tempo al tempo zumado de ligna teksilo el la domoj. Antaŭe, la loĝantoj portis vestojn el ŝtofo teksita de ili mem, sed nun la junuloj ne. Tamen, iuj maljunulinoj ne volas forlasi tiun tradician manlaboron. En libera tempo ili ŝatas teksu ŝtofon kaj fari veston en malnova stilo.

Tie la 3-etaĝa domo nove konstruita de la familio de maljuna He distingiĝas per moderneco. En la ĉambroj kun kahela planko

staras led-tegitaj sofoj, ŝranko-kompleto kaj aliaj modernaj mebloj. Maljuna He diris, ke liaj prapatroj loĝis en Shandong-provinco, poste ili translokiĝis en Fuchuan. Ĝis nun jam 6 generacioj de la familio He vivis tie. Oni povas diri, ke maljuna He estas indiĝeno. Kiel gardisto de la urbeto, li estis respektata de la loĝantoj pro siaj laboremo kaj fideleco dum dekoj da jaroj. Per sia lerta



Templo

farado de vino kaj toŭfuo, li vivtenis siajn gefilojn. Ne volante vivi senfare, li sin okupas pri kulturado de legomoj kaj bredado de centoj da porkoj kaj kokoj.

La loĝantoj ŝatas Guangxi-operon. En la norda urbeto estas scenejo kun historio de pli ol 400 jaroj. Maljuna Huang de la opera trupo, loĝanto de la urbeto, ek-lernis la operon en sia 14-jara aĝo kaj laboras kiel amatora aktoro dum la tuta vivo. Pro lia lerteco en prezentado, la opera trupo de najbara gubernio ofte invitas lin al instruado... La seninfanaj geedzoj Huang adoptis knabinon. En

la urbeto estas antikva moro, t.e. en la 10-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro tiu familio, en kiu naskiĝis filo, devas pendigi lanternon en la lanterna turo de la urbeto kaj senĉese anstataŭigi la kandelon elbrulintan per la nova, por ke la lanterno lumu ĝis la Lanterna Festo en la 15-a de la sama monato. Per tio oni dankas dion, ke li donis al ili filon, kaj petas dion beni la idon... Tiu-jare, maljuna Huang faris lanternon kaj pendigis ĝin en la turo. Vespere, en la turo brilis diversaj lanternoj kaj ekster ĝi tondris petardoj kaj bruegis tamburado kaj gongado. Loĝantoj dancis drako- kaj leonodancojn, dum maljuna Huang entuziasme prezentis Guangxi-operon. Pasintjare li pendigis alian lanternon en la turo, ĉar li fariĝis avo.

Dank' al la vivo kvietaj kaj harmonia, loĝantoj longe vivas. Sur la Floraj Stratoj ofte vidiĝas 80-90-jaraj maljunuloj. Ili diris, ke ili povas longe vivi, ĉar ili trinkas akvon el antikva puto. En la urbeto estas 9 antikvaj putoj kun bonkvalita akvo. Sur ilia rando el marmoro estas kavetoj 5-6 cm profundaj kaŭzitaĵoj pro longjara ŝnur-tirado de akvo. Neniu scias, kiam oni fosis tiujn putojn. Tamen cirkulas jena legendo: Antikve la fortreso estis sieĝita de malamikoj kaj al la loĝantoj mankis akvo kaj manĝaĵoj. Informiĝinte pri tio, Diino Wangmu ordonis al feinoj depreni de sia kapo jadan harpinglon kaj ĵeti ĝin al la fortreso. Kiam la harpinglo enpikiĝis en la teron, aperis putoj, el kiuj ŝprucis dolĉa akvo. La loĝantoj savitaj do konstruis en la fortreso templon, kie ili bruligis incensojn kaj faris preĝadon por danki Diinon Wangmu. ■






Infanoj



En korto



Spuro sur ŝtono de urbomuro





Strateto



Maljuna puto



Pordego de la urbeto



# Revo de ĉinaj piedpilko-maniuloj

Ĉinio:Irano — 2:4. Antaŭ la rezulto iu ĉina viro ploregis: “Ĉielo, vi estas maljusta!” Li estas pli-ol-40-jara kaj havas kromnomon Lossi, ĉar li tre ŝatas la faman italan piedpilkiston Lossi. Same kiel multaj aliaj ĉinaj piedpilko-maniuloj, li neniel komprenis, ke la ĉina teamo malvenkis en la unua matĉo de la kvalifika konkurso de Azio por la Mondpokala Piedpilka Konkurso. La ĉina teamo eĉ unue ŝotis dufoje en la golejon de la irana teamo, sed la rezulto... Lossi estas unu el la fervoraj ĉinaj piedpilko-maniuloj. Raportisto diris, ke por piedpilko, li perdis feliĉon de normala homo kaj vivas kiel asketo. Li planis vojaĝi tra la mondo por 6 jaroj por studi piedpilkadon, kaj plej grave por li estas bonvenigi la ĉinan teamon antaŭ la Triumfarko de Parizo en 1998.

Vojaĝi en 1998 al Francio, romantika lando, por partopreni en la lasta Mondpokala Piedpilka Konkurso de la 20-a jarcento. En Ĉinio, ne nur Lossi, sed ankaŭ multaj aliaj revas pri tio.

Fakte ĝi estas revo de ĉinaj piedpilkistoj kaj maniuloj de kelkaj generacioj. En la pasintaj 20 jaroj la ĉina teamo kvarfoje klopodis por sukceso en la kvalifika konkurso por la Mondpokala Piedpilka Konkurso, sed ĉiufoje ĝi elpaŝis kun plena espero, sed revenis kun granda bedaŭro. En 1985, en Pekino ĝi estis venkita de la teamo de Hongkong, kiu estis ne tre forta. Tio kolerigis la pilkomaniulojn, kiuj perdis la racion — okazis la unua tumulto de pilkomaniuloj en Ĉinio.

Tamen la maniuloj daŭre ŝatas piedpilkon, kaj samtempe la multaj malvenkoj pensigis ilin. Ili komprenis, ke kvankam en Ĉinio estas multaj loĝantoj kaj oni de antikve jam ludas piedpilkon, tamen Ĉinio restas tre malforta en piedpilka ludo. La profesia piedpilka sistemo estis praktikata en Ĉinio nur kvar jarojn. La ludistoj bezonas komprenon kaj subtenon. La maniuloj daŭre amas piedpilkon,

ĉar ĝi fariĝis nemalhavebla parto de ilia vivo.

Maljuna ĵurnalo-vendisto diris, ke ĉiam, kiam la ĵurnalo “Piedpilko” eldoniĝis, multaj junuloj kaj mezaĝuloj venis al la budo por aĉeti ĝin. Antaŭ dekelkaj jaroj aperis “Piedpilko” kiel felietono de tagĵurnalo. La redaktoroj tute ne antaŭvidis, ke ĝi fariĝis unu el la plej ŝatataj ĵurnaloj en Ĉinio.

Post ekpraktikado de la profesia sistemo fondiĝis multaj kluboj de maniuloj, kiuj fidele kaj konstante subtenas la piedpilkistojn. Se la ŝatata teamo mal-

venkis, la maniuloj kun kolerego diris: “Ni neniam rigardos la ludon.” Sed informiĝinte ke okazos nova matĉo, ili denove sin direktas al la stadiono, sidas antaŭ televidilo aŭ eĉ trajne aŭ aviadile veturas al alia urbo sekvante la teamon. Iu diris, ke en la stadiono oni rigardas la matĉon, sed ĝustadire, oni rigardas la maniulojn en la spektejo, kiuj kune krias. Kaj oni iom post iom partoprenas en la kreado de dekoj da miloj da aplaŭdantoj. Tambura-

do, kantado kaj trumpetado kunfandiĝas kaj emocias ĉiujn ĉeestantojn.


Ĉi-foje, 10 aziaj teamoj ludis en du grupoj por tri kaj duono de la eniraj biletoj por la Mondpokala Piedpilka Konkurso en Francio en 1998. Antaŭ la unua matĉo iu knabino faris 999 steletojn por beni la ĉinan teamon. Sed ŝi vidis malan rezulton. Iu studento verkis artikolon, en kiu li objektivis komentis la matĉon kaj donis tre bonajn konsilojn, krome, li akre kritikis la trejnistojn kaj ludistojn, kio montras lian amon al kaj deziron pri piedpilka ludo de Ĉinio.

Pro piedpilko, Francio '98 iris en la revon de la ĉinaj piedpilko-maniuloj. Neniu volas malesperigi tiel fidelajn maniulojn. Ni tamen deziras, ke la piedpilko-maniuloj de Ĉinio komprenu, ke la revo estas bela, sed la piedpilka ludo kruela. ■



Pilkomaniuloj





# Fajro-baseno Turpan

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

**L**A baseno Turpan, ĉirkaŭita de montoj kovritaj de neĝo, kuŝas sude de Tian-shan-montaro, Xinjiang (Ŝinĝjang). Kiel la plej malalta kaj plej varma loko en Ĉinio, ĝi estis sidejo de la antikva regno Cheshi en la Okcidenta Regiono kaj pasejo sur la meza branĉo de la Silka Vojo en Xinjiang. Tie somero estas tiel varma, ke la temperaturo iam atingis eĉ 49.6°C. Historia libro notas, ke en Turpan la suno brilas kiel fajro brulanta kaj la vento blovas sur la korpon kiel gladilo varmega. Tie cirkulas jena popol-diro: "Guberniestro laboras en vazo kun akvo pro varmego." Ĝuste pro tio de antikve Turpan portas ankaŭ la nomon Fajro-baseno.

## LEGENDO PRI LA FLAMO-MONTO

En julio Turpan ŝajnas granda fajrujo kaj la Flamo-monto — brulanta karbo en ĝi. Sub la arda suno ĝi ruĝiĝas kaj el ĝi leviĝas vaporo kvazaŭ saltanta flamo. Alproksimiĝante al ĝi de Gobio


kun temperaturo de 70°C, ni sentis nin rostataj.


Geologoj konstatis, ke la Flamo-monto vere fajris pro membrulado de karbo kaŝiĝanta en la ĵurasa formacio. Ne povante klarigi tiun eksterordinaran fenomenon, antikvuloj nur fidele notis, ke la monto flamas kaj fulgas; en la subiranta suno ĝi similas al giganta torĉo...

La Okcidenta Regiono abundas

je asbesto. Antaŭ tre longe la lokanoj teksis el ĝi ŝtofon kiel tributon por la kortego en centra Ĉinio. Ne sciante, el kio oni faris tian fajro-eltenan ŝtofon, la loĝantoj de centra Ĉinio pensis pri la Flamo-monto kaj supozis, ke en fajro de la Flamo-monto kreskas arboj kaj herboj, vivas birdoj kaj bestoj, kaj pro tio ekzistas fajro-eltena ŝtofo, kiu estas farita aŭ el ŝelo de tiuj vegetaĵoj aŭ el plumo




SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







1. Turistoj aĉetantaj sensemajn vinberojn
  2. En sezono de rikolto
  3. En vinber-sekigejo
  4. Subtera kanalo ligita kun putoj
  5. Rikolto de kotono
- Foto de LIU SIGONG





de tiuj birdoj aŭ el felo de tiuj bestoj.

En la ĉina klasika romano "Pilgrimado al la Okcidento" la Flamo-monto havas pli da misteroj: Ĝin transirante, fandiĝis eĉ homoj el fero aŭ ŝtalo. Pro tio, bonzo Xuanzang de Tang-dinastio (618-907) kaj liaj disĉiploj, kiuj okcidenten vojaĝis por peti sutrojn, devis prunti ventumilon de monstro Princino Fera Ventumilo por estingi la fajron sur la monto antaŭ ol transiri ĝin, sed ŝi rifuzis helpi ilin. Do simio Sun Wukong, unu el la disĉiploj de la bonzo, transformiĝis en insekton, enŝteliĝis en ŝian ventron, tie batadis kaj ruliĝadis. Ne povante elteni la doloregon, ŝi pruntedonis al ili la ventumilon. Kvankam "Pilgrimado al la Okcidento" estas legendo, tamen ĝi baziĝas sur fakto, ke en 629 bonzo Xuanzang de Tang-dinastio pilgrimas de Xi'an tra Turpan al Hindujo. Dum la vojaĝo li spertis sennombrajn malfacilojn.

## EN VINBERO-VALO

La nomita valo abunda je vinberujoj etendiĝas sur la ruĝa kaj dezerta Flamo-monto. Tie estas malvarmete kaj aromas vinberoj.

De antikve Turpan riĉas je vinberoj. Oni ne scias, kiam vinberoj de Afriko kaj Eŭropo enkondukiĝis en Turpan. En ĉina historia libro legiĝas, ke antaŭ pli ol 2 000 jaroj, kiam Zhang Qian (Ĝang Ĉjan), sendito de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) alportis de la Okcidenta Regiono vinberarbedon al la imperiestra ĝardeno kiel ornamanto planton, en Turpan oni jam grandaree kulturis vinberojn kaj faris el ili vinon. Antaŭ 1 700 jaroj vinberoj kiel tributo estis transportitaj en centran Ĉinion. Poste iu revizoro de la kortego alportis el Turpan vin-faran teknikon.

Lokanoj diris, ke vinberoj de Turpan ĝuas renomon, dank' al la favoraj klimato kaj geografia situo. En Turpan ardas la suno,

tio utilas al sukero-akumuliĝo de vinberoj; en tiu loko grava sur la Silka Vojo kolektiĝis famaj produktoj el la Oriento kaj Okcidento. Ekz.. en Vinbero-valo prosperas 400 hektaroj da vinberujoj de pli ol 600 varioj, el kiuj la plej

fama portas la nomon Wuhebai. La nomitaj vinberoj sensemaj, helverdaj kaj iom pli grandaj ol sojfabo estas ne nur dolĉaj kiel mielo, sed ankaŭ transporteblaj foren kaj longe konserveblaj, sekiĝinte.



Rikolto de vinberoj



Sabloterapio



## Vinbero-valo

En la valo mi konatiĝis kun knabo, kiu vendas sekvinberojn. Li nomiĝas Saimaiti. Kun alta nazo, profundaj okuloj kaj buk-laj haroj, li estas tipa posteulo de la Okcidenta Regiono. Je nia unua renkontiĝo li skribis al mi sian nomon sur la mano. Rigardante la zigzagan skribaĵon, mi nekomprene skuis la kapon. Li tuj kuris al sia vendobudo kaj prenis sian legitimacion, sur kiu estas lia nomo en Han-lingvo. Ankaŭ liaj kolegoj prezentis al mi la sian. Mi gustumis iliajn sekvinberojn oranĝajn, ruĝajn, flavajn kaj verdajn, kiuj ĉiuj estas bongustaj. Nur tiuj, kiuj similas al pipro havas adstringan guston. Saimaiti diris al mi, ke ili kuracas morbilon. Kvankam ilia produktovanto estas malgranda, tamen ĉiuj familioj ilin kulturas. Malfeliĉe, lia patro jam forpasis kaj lia maljuna patrino ne bone fartas. Pro tio, amikoj ofte helpas ilin en vinber-rikoltado.

Kiel ĉiuj tomboj de




Gastoj regalataj per fruktoj

prauloj en la valo, ankaŭ tiu de la patro de Saimaiti kuŝas apud ilia domo destinita por sekigi vinberojn. La tombo, sur kiu staras krescento, similas al renversita lulilo. Ujguraj islamanoj enterigas mortinton sen ĉerko tuj apud lia domo. Kiel vinberkulturistoj dum la tuta vivo, ili volas, eĉ forpasinte, esti vinbergardistoj.

Kun muroj plenaj de ventolaj truoj, rektangulaj domoj destinitaj por sekigi vinberojn konstruiĝis el adoboj. Ni vizitis unu el ili. Sub ĝia plafono pendas lignaj stangoj kun feraj dratoj, al kiuj oni alkrōças grapolojn da vinberoj.


Ŝajnis al mi, ke la lignaj stangoj kun vinberoj estas smeraldaj kolonoj kaj la domo plena de tiaj kolonoj.

El kamparana korto ŝirmita per verdaj lianoj ofte flirtis agrablaj muziko. Por festi riĉan rikolton de vinberoj knabinoj gaje dancis. Tamen la plej altira por mi estis knabo kun longaj okulharoj



Tombejo de ujguroj







kaj grandaj okuloj. Ĉiufoje, kiam mi renkontis kaj kapsalutis lin, li tuj ekdancis ridetante, kun mieno gaja, humura kaj petolema. Li ne bezonis akompanon de muziko. Ŝajnis, ke bela melodio kuras tra lia korpo. Dum tiu vizito ni amikiĝis.

## VITALA ARTERIO DE TURPAN

En Turpan la klimato estas seka kaj varmega. La jara meznombra pluvokvanto estas apenaŭ 16 mm, sed la vaporiga kvanto superas 3 mil mm. Malgraŭ tio, prosperas tie kotonujoj kaj vinberujoj. Kie estas ilia vivofonto?

Ni trovis la solvon en la dezerto ĉe la Flamo-monto. Tie estas multaj putoj kun elstaranta rando kiel kratero kaj distancas je 10-20 m unu de alia. Subtere kanaloj interligas ilin. Laŭ tiuj kanaloj akvo fluas al surtera kanalo profunde de la baseno kaj akumuliĝas en cisterno. Poste oni kondukas la akvon laŭ kanaletoj al kampoj kaj fruktoĝardenoj. Tiuj putoj kaj kanaloj estas vitala arterio de Turpan.

Profitante de la topografio de la baseno, oni faris tiujn putojn kaj kanalojn. Ĉar la akvovaporo el oceano estas barita de altaj montoj ĉirkaŭ Turpan kaj frostiĝas sur ili, en la malalta baseno malmultas pluvo. Somere likviĝas neĝo sur la montoj, sed tiuj likvaĵoj malsupren fluantaj rapide malaperas en dezerto. Putoj interligitaj per subtera kanalo servas kiel ricevujo de la tralikiĝinta akvo. Laŭ statistiko en Turpan troviĝas 1.5 mil tiaj kanaloj kun totala longo de pli ol 5 mil km. Oni nomas ilin Granda Subtera Kanalo.

Fosi tiajn putojn estis peniga laboro. Kurbiĝante, la fosantoj tutjare laboris per pezaj iloj en malluma kaj malseka subtera loko kun akvo. Terfalo ĉiam minacis ilin. Kiam paŭzis putofosado, ili senŝlimigis subteran kanalon, kontrolis kaj riparigis murojn de

putoj. Alie, se la putoj ne plu povus esti uzataj, la kampoj kaj fruktoĝardenoj fariĝus dezertaj kaj la vilaĝanoj — vagabondoj. Pro tio la putofosantoj estis ege respektataj de la vilaĝanoj. En la putofosaj tagoj la islamanoj preĝis en moskeo por ilia sekureco. Kaj la vilaĝanoj regalis ilin per festeno. En la feŭda socio nur riĉaj bienuloj povis dungigi laborulojn por fosi putojn. La bienuloj estis mastroj de akvo kaj la putoj ofte portis ilian nomon. La loĝantoj devis pagi al ili por preni akvon.


En Yar-vilaĝo ni rigardis malnovan puton. Enirinte en ĝian subteran kanalon, ni rimarkis, ke tie kreskas eĉ maljuna arbo, sur kies branĉoj kantas birdoj. Tra difektita loko super la kanalo la arbobranĉoj etendiĝas surteren. En la subtera kanalo murmuris klara akvo. El la puto estis ĉerpanta akvon junulino kaj ĉe la puto ripozanta blank-hara maljunulo en blankaj vestoj kaj blanka ĉapo. De li mi informiĝis, ke el la puto leviĝas varma vaporo vintre kaj blovas malvarmeta vento somere. Antikve, ofte komercistoj vojaĝantaj laŭ la Silka Vojo ripozis ĉe la puto. La homoj kaj brutoj, ĉiuj trinkis akvon el la puto. Nun la lokanoj ŝatas babili, tagmanĝi kaj siesti ĉe la subtera kanalo, aŭ, kiel siaj prauloj, fosi kavon sur muro de profundaj putoj por konservi glacieron por uzo en somero.

Laŭdire, ankaŭ en Afganio, Turkio, Irano kaj aliaj landoj de

Centra Azio estas tiaj putoj. Do, ekzistas diversaj diroj pri ilia origino.

Ĉina historia libro notas, ke imperiestro Wudi de Han-dinastio (140-88 a.K. sur trono) rekrutis dek milojn da homoj por fosi kanalon, konduki akvon kaj trakti alkalon teron. Pro terfalo oni fosis putojn interligitajn per subtera kanalo kaj profundajn je pli ol 130 m. Poste, loĝantoj de centra Ĉinio senĉese transloĝiĝis en Turpan, eble inter tiuj enmigrintoj estis akvoutiligaj konstruistoj. En la 50-aj jaroj de la 20-a jc. oni konstruis akvokonservejon en nordorienta Turpan, sed 2 monatojn poste, ĝia akvo malaperis. Post esplorado, oni malkovris sub ĝi 3 malnovajn putojn interligitajn per subtera kanalo. Ilin ŝtopinte, oni denove akumulis akvon en la akvokonservejo, sed akvo denove malaperis, ĉar pli profunde de la akvokonservejo kaŝiĝis multaj eluzitaj putoj kun historio de almenaŭ mil jaroj. Antaŭ kelkaj jaroj oni trovis en montregiono de Turpan bildojn sur roko apartenantaj al pratempo, kiuj prezentas tiajn putojn.

Fakte, ne gravas, kiam kaj kie naskiĝis putoj interligitaj per subtera kanalo, sed valoras, ke tiu granda invento disvastiĝis laŭ la Silka Vojo en multajn landojn kaj regionojn suferantajn de akvomanko. Kaj hodiaŭ la tieaj loĝantoj ankoraŭ ĝuas akvon el tiuj putoj. ■



Longa barbo

Karikaturo de WU ZHIRU



**L**Aŭ la ĉina luna kalendaro 1998 estas la Jaro de Tigro. Tiujare furoras bonaŭguraĵoj de tigo kaj multas anekdotoj pri ĝi.

## IMPONA TIGRO

Kun nur unu subspecio, la tigroj apartenas al la rabobestoj de la felisedoj. La sud-ĉiniaj kaj Bangladeŝaj tigroj estas iom malpli grandaj ol la nordorient-ĉiniaj kaj siberiaj. Kvankam ili aspektas kiel kato, laŭ kiu iuj pentras ilin, tamen kato ja estas kato kun neniom da imponeco de tigo. Plie, en la mondo estas multaj subspecioj de katoj ĉarmaj kaj mildaj, sed ne majestaj.

Ĉinoj ofte komparas danĝeran situacion kun nesto kaj faŭko de tigo. Ekz., se granda danĝero trafis iun, sed ne forrabis lian vivon, ĉinoj do diris, ke li saviĝis el la tigra faŭko; aventuro aludas “esploradon en tigra faŭko”; “eltiri denton de tigo” signifas riskon de la vivo kaj “postuli de tigo ĝian felon” — tromalsaĝon.

## AMEMA TIGRO

Adorado al tigo havas longan historion. Ĉina mito diras, ke diino Xiwangmu havas figuron duonhoman kaj duonbestan kun tigras dentoj kaj leoparda vosto kaj emas muĝadi. Surbaze de tiuj

# Anekdotoj pri tigro

de YANG ZHEN

Kiel reĝo de la bestoj, la tigroj, imponaj kaj facilmovaj, timigas per sia muĝado. En la antikveco ĉinaj generaloj pendigis tigrofelon en sia tendo aŭ sternis ĝin sur sia trono por intensigi sian majestecon. Do, ĉinoj nomis la tendon de generalo tigrotendo; la majestecon de generalo — tigra majesteco; kaj bravan generalon — tigra generalo. Eĉ hodiaŭ oni komparas ĉiujn bravajn generalojn kaj eminentajn sportistojn kun tigo.

La imponeco de tigo estas vidata ankaŭ en iuj esprimoj. En Ĉinio cirkulas la proverbo “Vulpo prunteprenas la teruraĵon de tigo”. Ĝi devenas de jena fablo: La vulpo pretendas esti reĝo de la bestoj. La tigo ne kredis. La vulpo trompis ĝin, dirante: “Vi do sekvu min kaj rigardu, kiel la bestoj agos kun mi.” La tigo iris malantaŭ la vulpo en arbaron. Vidinte la tigron, la bestoj terurigiĝis kaj kuris disen. La tigo trovis, ke ili ĉiuj vere timis la vulpon, ne sciante, ke la vulpo prunteprenis ĝian teruraĵon. La proverbo mokas tiujn, kiuj faras malbonaĵon utiligante alies prestiĝon.

karakterizaĵoj oni konjektas, ke la figuro de la diino estas unuiĝo de tigra totemo kaj figuro de tribestrino de la ĉina matriarka klana socio. Kiel la plej alta justico-diino, ŝi respondecis pri kondamno, epidemio kaj katastrofo en la homa mondo. Kun la disvolviĝo de la ĉina mitologio ŝi fariĝis afabla kaj respondecis pri nasko, geedziĝo k.a. Pro tio ŝi estas vaste ŝatata, precipe de la virinoj.

Ĉinaj popolanoj opiniis, ke la tigo estas justama kaj manĝas diablon. Laŭ ĉina mito, en la pratempo estis du dioj lertaj en kaptado de diabloj. Kaptinte diablon, ili manĝigis ĝin al tigo. Ni turnu nin al jena ekzemplo. Bronza vinujo, farita antaŭ 3 000 jaroj, figuras tigron manĝantan diablon. Ĉina mito diras, ke la tigo ekzorcas diablon. Tial antikvaj ĉinoj pentris tigron sur pordo por festi la Printempan Feston. Poste, ekfuroris la moro, ke dum la Printempa Festo oni algluis al pordo pentraĵon kun figuro de tigo kiel dio de pordo. Antikvaj ĉinoj faris verdikton kun helpo de tigo. Ili manĝigis ĉiujn krimulojn al tigo. Laŭdire iu antikva juĝisto

bredis ses tigrojn kaj ses krokodilojn. Kiam li havis malfacilon en verdiktado, li do metis la koncernaĵojn inter ilin. Kiu ne estis manĝita de ili, estis senkulpa.

Ĉi la tria jc ĉe la limo inter la nunaj Henan kaj Shaanxi (Ŝenŝji) furiozis tigroj. Poste estis enoficigita iu persono, korinklina al la popolanoj. Li praktikis humanan politikon. La tigroj kaj iliaj idoj forlasis la lokon por montri sian subtenon al li. En la antikva libro "Mirrakontoj de Liaozhai" de Qing-dinastio (1644-1911) estas skribite, ke filo de maljunulino estis mortigita de tigo. Loka juĝisto kondamnis la tigron je vivtenado al ŝi ĝis ŝia morto. Tial, ĉiutage ĝi alportis al ŝi ĉasaĵon. Kaj post ŝia morto ĝi funebriĝis antaŭ ŝia tombo.

Zoologoj opinias, ke ĝenerale dirite senkaŭze tigroj ne atakas homon. Nur la malsanaj kaj maljunaj, kiuj havas malfacilon por akiri ĉasaĵon, atakas homon. En la nutro-ĉeno de la naturo la homoj

kaj tigroj povas kunekzisti pake. De antikve cirkulas rakontoj pri homoj kaj tigroj. Ekz., tigrino mamnutris forlasitan bebon, kiu poste fariĝis eminenta talentulo. Estas alia bela rakonto, ke tigo akompanis novedzinon al la nupto. En Guizhou kaj Shaanxi estas temploj de svatisto-tigro kaj geamantoj preĝas en ili, ke la svatisto-tigro benu ilin en ilia feliĉa vivo.

## NAIVAJ TIGRO-FIGUROJ

La 5-an de la 5-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro okazas la Drakboata Festo. Tiutage la ĉinaj popolanoj kutimas pendigi artemizian tigron, ĝui zongzi-ojn (piramid-forma manĝaĵo el glueca rizo volvita en bambuaj aŭ fragmitaj folioj) kaj okazigi drakboatan konkurson. Artemiziaj folioj estas uzataj por forpeli fiinsektojn kaj kuraci malsanojn. La artemizia tigo estas uzata kiel simbolo de resaniĝo. En iuj lokoj oni per realgaro desegnas sur la frunto de infano striojn en formo de  $\Xi$ , kiaj sur la tigra frunto, cele forigi malfavoraĵojn. Infanoj kun tiaj strioj sur la frunto gaje ludas eksterdome, kio aldonas la festan etoson.

En la centra parto de la provinco Shaanxi cirkulas la moro, ke gepatroj donacas paron da grandaj tigroj el faruno al sia filino kiel doton. En la nupta tago antaŭ la akompanantoj de la novedzino marŝas tiuj, kiuj ŝultre portas lakitan ŝrankon kun la farunaj tigroj sur ĝi. Eble tio sekvas la moron, ke tigo servas kiel svatisto. Kiam la filo de la geedzoj fariĝas unu-monata, lia avino donacas al li argilan tigron. En Ĉinio cirkulas ankaŭ la moro, ke infanetoj portas tigroformajn ĉapon, salivtukon kaj ŝuojn kaj uzas tigroforman kapkusenon. Tiuj tigroformaj vivbezonaĵoj montras la deziron de la gepatroj, ke iliaj infanoj sane kresku kiel tigo. Diversaj ludiloj en formo de tigo popularas en Ĉinio. Plejparto de ili estas toltigroj tre amindaj.


Multaj nacioj de Ĉinio adoras tigron, precipe ji-nacio, kiu prenas 12 bestojn kiel simbolojn de naskiĝa jaro. La unua el ili estas tigo. Laŭ ji-oj, ĉiuj estaĵoj de la universo estas membroj de tigo: la kapo de tigo estas tiu de la ĉielo; la vosto de tigroj tiu de la tero; la barbo de tigo — sunlumo; la dentoj de tigo — steloj; ktp. Antikva libro diras, ke ie en Ĉinio oni nomas tigreton *lūolūo*. Kaj ji-oj nomas sin ankaŭ *lūolūo*, kredante sin transformi en tigron post la morto.

Ni deziras al vi ĉiuj ĉion bonan kaj grandajn sukcesojn en la Jaro de Tigro! ■



"Tigro" (Ĉinstila pentraĵo)





HOU JUELIANG:

# BESTO- PROTEKTADO EN ĈINIO

Orharaj simioj

**D**EPOST apero de homoj, bestoj estas iliaj amikoj. Ili kune vivis kaj multiĝis en longa tempo, dependante unu de la alia. Arkeologoj elterigis el la ruino de Longgushan-prahomoj en Zhoukoudian, Pekino, fosiliojn de mamuloj, kiaj sabro-denta tigro (*Machairodontinae*), Sanmen-ĉevalo kaj dikosta cervo (*Euryceros pachyosteus*) vivantaj antaŭ 690 mil jaroj, kaj trovis en Altamira-kaverno de Hispanio freskon de sovaĝbovoj kaj tiun de dresado de cervoj faritajn antaŭ pli ol dek mil jaroj kaj en Mesopotamia hieroglifajn skribojn pri fiŝoj kaj birdoj inter la kojnoskriboj far sumeranoj 3 000 jarojn a.K. Historio pruvis, ke ĝuste la bestoj kaj vegetaloj kune formis la medion, dank' al kiu la homoj vivas. Kaj protekti la medion signifas protekti la homaron mem.

Antikvaj ĉinaj filozofoj pledis por “unuigo de la ĉielo kaj homo”, t.e. unuigo de la homo kaj naturo, kun la celo, ke la homo protektu la naturon kaj revenu al

ĝi. Oni povas diri, ke tio estas burĝona mediprotekta konscio. Antaŭ 2 300 jaroj ĉina filozofo Mencio montris, ke moralulo devas esti humana, per sia humaneco unue ami siajn gepatrojn, poste aliajn homojn kaj fine ĉiujn vivajn estaĵojn. Laŭ Mencio amo al ĉiuj vivaj estaĵoj montras moralecon de homo, alie li ne estas morala.

Tamen en la reala vivo detrado de la medio, ĉasado kaj mortigo de bestoj okazas ofte. Laŭ statistiko, en la lastaj du jarcentoj pereis ĉ. mil specioj de bestoj. Antaŭ dek jaroj pereis unu specio de besto po kvar tagoj, kaj nun po kvar horoj. Pereo de unu specio de besto signifas, ke en la naturo malaperis unu genobanko, kio kaŭzos pereon de alispeciaj bestoj. Se oni ne protektus la ekologian medion nek bremsus la ptheadon, do fine la homoj mem pereus.

En la 50-aj jaroj Ĉinio komencis protektadon de sovaĝaj bestoj. Ĝis nun jam estas starigitaj pli ol 700 naturparkoj de sovaĝaj be-

stoj, kiuj formis protekt-reton de sovaĝaj bestoj tra la tuta lando. En la fino de la kuranta jarcento la nombro de naturparkoj de sovaĝaj bestoj superos mil. Por plifortigi la laboron la ĉina registaro publikigis “Leĝo por protekti sovaĝajn bestojn”, kiu difinis, ke kiu vundis aŭ mortigis raran beston aŭ birdon, estos laŭleĝe punita. Por protekti akvajn birdojn kaj gruojn sur la humida tero de nordorienta Azio, en marto 1997 Ĉinio, Japanio, Mongolio, Koreio kaj Rusio kune publikigis manifeston kaj deziris, ke la registaro de la kvin landoj kunlaboru por protekti la humidan teron kontraŭ poluado kaj degenerado de la akvaro.

La ĉinaj klimato kaj geografia situo donis bonan vivmedion al la sovaĝaj bestoj. En Ĉinio abundas riĉfontoj de sovaĝaj bestoj. En ĝi vivas pli ol 4 400 specioj de vertebraj bestoj, kiuj konsistigas pli ol 10% de la totala nombro de la mondo, ĉ. 500 specioj de bestoj, 1 189 specioj de birdoj, 320 specioj de rampuloj,

210 specioj de amfibioj kaj 2 000 specioj de fiŝoj. El la 257 specioj de sovaĝaj bestoj, protektataj de la ŝtato, estas raraj bestoj propraj al Ĉinio, kiaj granda pando, gruo, blanknaĝila delfeno kaj ĉina huzo.

Granda pando estas “nacia trezoro” de Ĉinio kaj ankaŭ komuna riĉaĵo de la homaro, ĉar la emblemo kaj standardo de la Monda Fonduso de Sovaĝaj Estaĵoj surhavas figuron de granda pando. La specio de granda pando vivis pli ol 3 milionojn da jaroj kaj estas rigardata kiel “viva fosilio” por esplori paleontologion. Grandaj pandoj tutjare vivas en arbaro sur monto 3 000 m super la marnivelo kaj manĝas ĉefe bambuojn (*Sinarundinaria nitida*). Komence de la 80-aj jaroj la bambuoj grandaree velkis en Ĉinio, kio minacis la vivon de grandaj pandoj. La ŝtato tuj alprenis konvenajn rimedojn kaj savis 90 grandajn pandojn el malsato kaj malsano. Tuj poste, estis starigitaj 13 naturparkoj de grandaj pandoj. Nun la protektado ankoraŭ daŭras. Laŭplane, en la venontaj dek jaroj ĝi investos 300 milionojn da juanoj por starigi pliajn 14 naturparkojn, kiuj interkomunikiĝos per 17 protektaj koridoroj. En ili kreskos bambuoj kaj arboj, por ke la grandaj pandoj per koridoroj transloĝiĝu aliloken, kiam ili troviĝos en danĝero de morto. Tiam ili povos kunvivi kun aliaj por ricevi idojn. Nun, en Ĉinio vivas pli ol mil grandaj pandoj, 800 el kiuj estas protektataj.

Ĉinio estas hejmlando de gruoj. En la mondo vivas 15 specioj de gruoj, el kiuj 9 troveblas en Ĉinio. Ili estas raraj de unuaranga protektado. En la mondo estas

sume 1 900 ruĝkrestaj gruoj, el kiuj 800 en Ĉinio; en la mondo — sume 3 000 blankaj gruoj kaj 2 900 el ili en Ĉinio; en la mondo — sume 5 300 gruoj kun duonblanka kolo (*Grus vipio*), el kiuj 4 000 en Ĉinio; kaj en la mondo — sume 6 000 nigrakolaj gruoj kaj 5 500 el ili en Ĉinio. La nigrakolaj gruoj vivas en herbejoj, marĉoj kaj lagoj sur altebenaĵoj 3 000 m super la marnivelo kaj manĝas maizon, terpomon, brasikon, rafanon, fiŝon kaj salikokon. Ili, kiel altebenaĵaj birdoj, estas raraj. Ruĝaj ibisoj estas laŭdataj kiel “rubeno”. Antaŭe oni sciis, ke sole en Japanio vivas kelke da nenaskipovaj maljunaj ibisoj bredataj en kaĝoj pro detruado de ekologia medio. Por savi la specion de birdo ĉinaj ornitologoj vojaĝis 50 mil km en 3 jaroj kaj en la komenco de la 80-aj jaroj trovis 9 ibisojn en la regiono de Qinling-montaro en centra Ĉinio. Oni sukcese faris re-

produktadon kaj nun jam naskiĝis tri ibisidoj.

La blanknaĝila delfeno aperis en la naturo antaŭ 25 milionoj da jaroj, pli frue ol la granda pando. Kiel mamulo, ĝi vivas en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero. Ĝi havas aparte evoluintan cerbon kaj delikatan sonar-sistemon kaj estas valora por esplori akustikon, biologion, zoologion kaj militan sciencan. Bedaŭrinde, blanknaĝilaj delfenoj estas malmultaj. Antaŭ duonjarcento estis 6 000 blanknaĝilaj delfenoj, sed nun estas nur 130. Se ili estus nebone protektitaj, ili pereus post 25 jaroj. Pro tio ĉinaj zoologoj jam enlistigis la blanknaĝilajn gruojn kiel urĝe savendajn bestojn.

Ĉinaj huzoj, pli ol 3 m longaj, vivas en Yangzi-rivero. Ili naĝas al la supra baseno de la rivero kaj tie demetas sian frajon. Kaj la huzidoj naĝas laŭ la rivero al maro, en kiu ili kreskas. En Ĉinio

estas starigita naturparko kaj ĉiujare oni ĵetas en ĝin multajn fiŝidojn por nutri ilin.

Kun protektado de la pereontaj bestoj Ĉinio ankaŭ prizorgas la vivon de ordinaraj sovaĝaj bestoj kaj gajnis bonan ekologian efikon. Birdoj estas protektantoj de agrikulturo kaj forsto. Ekde la 60-aj jaroj en multaj forstoj de Ĉinio oni pendigis artefaritajn birdonestojn por allogi birdojn. Iu forstejo en Henan-provinco ne plu uzis insekticidon, alloginte birdojn tiamaniere, kaj ne okazis insekta katastrofo. En kontrasto kun tio, en iu senbirda regiono oni uzis multe da insekticido, tamen 3-foje okazis serioza insekta katastrofo. Sekve, protektado de birdoj fariĝas memkonscia ago de homoj. ■



Kokoj (*Crossoptilon auritum*) bredataj en Kantono

# Instruistino Wan kaj ŝiaj kolegoj


Teksto kaj fotoj de ZHAO XI

Antaŭe Wan Xuanrong (Ŭan Ŝjŭanĵong) estis dancistino. Kiam kuracisto konstatis, ke ŝia pli-ol-unujara filo preskaŭ perdis la aŭdokapablon, ŝi forlasis sian profesion kaj komencis serĉi efikan kuracadon. Kiam la kuracistoj malesperis pri kuracado, ŝi decidis mem provkuraci la filon. Ses jarojn poste, ŝiaj penoj estis rekompencitaj per sukceso. Ŝia filo komencis viziti ordinaran lernejon. Li progresis rapide kaj gajnis bonajn notojn en la lernado. En la tutlanda konkurso de geknaboj pri poemo-deklamado li ricevis la unuan premion. En tiu momento venis al ŝi en la kapon ideo servi al pli multaj surdamutaj infanoj. Ŝi starigis la Ĉinan Konvaleskan Centron de Surdamutaj Infanoj kaj en ĝi laboras 150 instruistinoj.

En la centro ili devas labori multe pli pene ol instruistinoj en ordinaraj lernejoj. Por paroligi surdamutajn infanojn ili ripetade faras gestojn kaj prononcojn. La surdamutaj infanoj estas obstinaj kaj memestimaj, tial la instruistinoj devas flegi ilin kiel iliaj patrinoj.

La instruistinoj laboris por la surdamutaj infanoj jam

kvin jarojn. Preskaŭ ĉiuj 400 surdamutaj infanoj, kiujn ili ekzercis, akiris aŭ reakiris la kapablon paroli kaj aŭdi. 75% el ili jam vizitas ordinaran lernejon.



Leciono



Post leciono





“Kiom faras unu kaj unu?”



Instruado de skribado



Instruistino kaj surdamuta infano

# Kolektado de olelampoj

**O**LELAMPO, kiel lumilo konservata jam delonge en muzeo, estas senvalora por modernuloj, tamen kurioza por kolektantoj de antikvaĵoj. Mi estas kolektanto de olelampoj. Nemalmultaj primitivaj lumiloj el bovlo, oleo kaj meĉo fascinas min

per delikataj materialoj, formoj kaj ornamaĵoj.

En vendejo de malnovaĵoj en Pekino mi aĉetis olelampon.

Tiun tagon, mastro Ji (Ĝji) de la menciita vendejo, kiu kolektis malnovaĵojn en kamparo, revenis al ĝi. Inter la kolektitaj vazoj

kovritaj de olemakuloj kaj polvo estis bovloforma objekto. Post viŝado mi trovis, ke ĝi estas nigre glazurita ceramikaĵo produktita en popola bakujo. La nigre glazurita surfaco plenis de strioj nomataj leporharetoj, kion alte taksis ĉinaj kuriozaĵistoj. Kvankam mi ne

La aŭtoro (dekstre) en vendejo de malnovaĵoj



povis certiĝi, ĉu la objekto devenis de fama bakujo kaj ĉu la strioj estas la nomitaj leporharetoj, tamen mi konsciis ĝian rarecon. Ji diris al mi, ke ĝi estas bovloforma olelampo, produktita en Song-dinastio (960-1279).

Mi kunportis hejmen la olelampon. Post trempado en varma akvo kaj forigo de olemakuloj ĝi ree prezentis sian belecon, malgraŭ difektoj ĉe la rando kaj manko de glazura brilo. Tiam iu kolektisto okazigis en Pekino ekspozicion de olelampoj. Tiukaze diversaj olelampoj havis grandan debiton en la merkato. Kaj pli intensiĝis mia intereso pri olelampoj kaj iom post iom multiĝis miaj kolektaĵoj.

Nespertuloj iafoje maltrafas sukceson en distingado de vereco, aĝo aŭ produktejo de tiuspecaj varoj. En la Panjiayuan-a Bazaro de Malnovaĵoj en Pekino estas pli ol du mil budoj, kie vendiĝas veraj kaj falsaj antikvaĵoj. El ili oni povas elekti la verajn dank' al sia distingemo.

Foje mi prenis kupran nutraĵujon de birdo por olelampo, alifoje alilandan objekton por ĉina. Tamen tio ne reduktis mian intereson pri kolektado, kaj mi kolektis nemalmultajn raraĵojn kun tempopaso.

Ĉiuj miaj olelampoj apartenas al produktaĵoj de popolaj bakujoj. En la feŭda socio de Ĉinio oni kutime dividis la ceramikaĵojn en du specojn: "de popola bakujo" kaj "de kortega bakujo". La lastaj estis propraj al la imperiestra familio. Uzi ilin, iliajn bildojn, precipe drak-bildojn, estis malpermesate al la popolanoj. Ĝis Qing-dinastio (1644-1911), tiuj, kiuj sensankcie uzis bildojn specialajn por la imperiestra familio, eble estis kondamnitaj al morto. La ceramikaj olelampoj, faritaj de kortega bakujo, grandaj, subtilaj, helkoloraj kaj delikataj, aspektas luksaj. Tiuj, faritaj de popo-

la bakujo, estas krudaj kaj fortikaj. Mi preferas la lastajn ne nur pro ilia malmultekosteco, sed ankaŭ pro ilia arto.

Inter miaj kolektaĵoj pli ŝatataj estas infanfiguraj olelampoj faritaj antaŭ kelkcent jaroj. Iu prezentas infanfiguron portantan sur la kapo olelampon kiel ĉapelon, alia geknabofigurojn, kiuj alte tenas po unu olelampon super la kapo. La knabino estas bela kaj sur ŝia antaŭtuko estas desegnita umefloro; la knabeto graso havas du nigrajn makulojn sur la vangoj ŝajne ricevintajn en petolado kaj sur lia antaŭtuko estas skribita la vorto "feliĉo".

Mi konservas dumeĉan olelampon malofte vidatan inter la antikvaj olelampoj. Ĝi estas delikata, en formo de svelta knabino.


Menciindas ankaŭ malgranda kruĉforma olelampo, kiu estis farita en la jaroj 222-589 p.K. Tamen ĝi ne estas okulfrapa, kun nigre glazurita parieto, malgranda tenilo kaj elstaraj strioj ĉe la aperturo, el kiu elteniĝis la meĉo. Tiun tagon mi trovis ĝin en Panjiayuan-bazaro, kaj mi demandis la vendanton, ŝajnigante, ke mi ne rekonis ĝin.

"Kio estas tio ĉi?"

"Kruĉo." Evidente li ne sciis, kio ĝi estas kaj kiom ĝi valoras.

"Kie estas la kovrilo?" (Efektive, ĝi ne havas kovrilon.)

"Mi aĉetis ĝin sen kovrilo." Sen kovrilo la kruĉo kiel nekom-



Infanfigura olelampo

pleta varo kompreneble kostas malpli multe. En Panjiayuan-bazaro ofte okazas tia marĉandado, en kiu ĝuste kuŝas la ĉarmo de la loko. El marĉandado la aĉetantoj kaj la vendantoj havis kaj gajnon kaj perdon. Tamen por la aĉetantoj la plej grava estas ĝojo en kolektado. ■



## NENIAM SUBIGEBLA NACIO

Lastatempe en kinoteatroj de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj urboj de Ĉinio estas prezentata la filmo "Valo de Ruĝa Rivero", kiu temas pri la historio okazinta en Tibeto komence de la nuna jarcento. Brita ĵurnalisto Jones venis al Tibeto kun brita ekspedicio. Li, savita de tibetanoj el akcidento, konatiĝis kun Dainchub, filino de tribestro, hana knabino Xue'er kaj tibeta ĉasisto Gyaisang.



Xue'er

Tiam Xue'er kaj Gyaisang enamiĝis unu en alian. Nelonge poste, britaj trupoj invadis Tibeton. Kaj Dainchub, Xue'er, Gyaisang kaj multaj aliaj hanoj kaj tibetanoj faris bravan reziston kontraŭ la agreso. Vidinte tion, Jones asertis: "Tio estas nacio, kiu neniam estos subigebla nek eliminebla."

En miksado de la kriza momento, decida por sorto de la herooj, kaj kortuŝa amafero, la filmo prezentas la profundan amikecon inter la hanoj kaj tibetanoj, ĉarman pejzaĝon de la neĝkovrita tero kaj tibetan kulturon malmulte konatan.

La filmo estas reĝisorita de Feng Xiaoning (Feng Ŝjaŭning) kaj produktita de la Ŝanhaja Filmo-studio. Dum filmado la filmistoj el sep landoj laboris sur la Tibeta Altebenaĵo 5 000 m super la marnivelo, timante neniun malfacilon.

Ili estas laŭdataj de la ĉina filmista rondo kaj spektatora publiko pro tio.

## BENA EN ŜANHAJO

La patro de Bena laboras kiel altranga oficisto de ĉina-brita kompanio de Ŝanhajo. Antaŭ tri jaroj la 6-jara Bena, forlasinte sian hejmlokon, venis al Ŝanhajo kun sia patro kaj daŭrigis lernadon en lernejo de la urbo. En ĝi ŝi ne nur lernis kion ŝiaj kamaradetoj lernis en Britio, sed ankaŭ konatiĝis kun multaj alilandaj lernantoj. Ili kune lernis skribi ĉinajn ideogramojn, fari pentradon kaj ludi pekinan operon.

La Internacia Lernejo Yaozhong de Ŝanhajo, kie ŝi lernis, nombris pli ol 600 lernantojn. La lernejo estis fondita en 1993 speciale por la geknaboj de tiuj alilandanoj loĝantaj en Ŝanhajo. Ĝi estis bone ekipita, kun bela gazono destinita por la geknaboj.

La Internacia Lernejo Yaozhong de Ŝanhajo, kie ŝi lernis, nombris pli ol 600 lernantojn. La lernejo estis fondita en 1993 speciale por la geknaboj de tiuj alilandanoj loĝantaj en Ŝanhajo. Ĝi estis bone ekipita, kun bela gazono destinita por la geknaboj.

La lernejo ampleksis infanĝardenon, element-kaj mez-lernejojn, kun 33 grupoj. Ĉiu grupo estis gvidata de ĉinaj kaj alilandaj instruistoj. La lernantoj lernis ne nur du malsamajn lingvojn, sed ankaŭ orientan kaj okcidentan kulturojn.

## ALIA PLI-OL-8 000-METRA MONTPINTO TROVITA EN ĈINIO

Fakuloj de la Lanzhou-a Instituto pri Glaci-rivero kaj Tundro sub la Ĉina Akademio de Sciencoj malkovris en la subregiono Kaxgar de Xinjiang (Ŝingĵang) montpinton 8 010 metrojn super la marnivelo (76°34'E, 35°49'N) malproksime de glaci-riveroj en Karakorum-montaro kaj je 8.35 km sudoriente de Qogir-montpinto, la dua montpinto en la mondo. Oni donis al ĝi la nomon Zhongyang-montpinto. Nun sur nia terglobo estas malkovritaj sume 15 montpintoj kun altitudo de pli ol 8 000 metroj.

Desegnante la mapon de Qogir-montpinto, ĉinaj geologoj trovis ĝin. Ili konigis, ke jam en 1976 ili sukcesis mezuri ĝiajn altecon kaj situon. Sed, opiniante, ke ĝi estas kontinua parto de la montpinto Buloato unu kilometron for de ĝi, ili ne donis al ĝi apartan atenton. Fakte, inter la du montpintoj staras montpinto 7 830 m super la marnivelo. Tio pruvis, ke Zhongyang-montpin

to ekzistas tute sendepende.

## KIAL SABLO MUZIKAS?

Bruanta sablo portas ankaŭ la nomon muzikanta sablo kaj estas ĉe marmalprofundaĵoj kaj en dezertoj. Ĉinio havas kvar bruantajn sablo-montojn. Unu el ili kuŝas en la Interna Mongolio kaj la aliaj sur la antikva Silka Vojo en nordokcidenta Ĉinio. La Bruanta Sablo-monto proksime de Mogaoŝtonkavernaro en Dunhuang povas doni belan sonon, karesate de zefiro kaj alia forto. Tio vekis grandan intereson de sciencistoj en diversaj landoj.

Prof. Qu Jianjun el la Lanzhou-a Instituto pri Dezerto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj faris multjaran studadon pri bruanta sablo. Li trovis, ke sub elektrona mikroskopo la sableroj el tiu monto estas tute malsamaj ol la ordinaraĵoj kaj havas sen-nombrajn ĉelarajn truetojn sur la surfaco, kiuj formas multege da resonatoroj. Kiam sableroj eligas subtilajn sonojn pro reciproka frotado, la resonatoroj resonigas ilin. El tio li deduktis, ke sonado de sablo dependas de la fizika strukturo de sablera surfaco. Por pruvi sian konkludon li traktis la surfaceton de nesonantaj sableroj, vitreroj kaj organikaj rezineroj. Rezulte, ili ĉiuj sonis kiel bruanta sablo.

Qu montris, ke por ebligi sonadon al sablo necesas ankaŭ eksteraj kondiĉoj, kiaj deklivo de sablo-monteto, unuformeco kaj akvoenteno de sableroj. Kaj la interna kaŭzo de sonado estas ĉelaro formita post longtempa erozio en la naturo. Kiam la ĉelaro estas ŝtopita de polvo, tiaj sableroj ne plu sonas. Jen en tio kuŝas la kaŭzo, kial bruanta sablo mutiĝas.



Qu Jianjun esploranta en dezerto (maldekstre)

# Paco- Kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj,

Importo kaj eksporto de komercaĵoj, internacia geedziĝo.

Registrita numero:  
14896279-1

Adr.: Direktoro Ling Bo, P. O. Box 2, CN-230001,

Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545/ -4484606

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el *El Popola Ĉinio* kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenon.



---

Pekino estas kultura urbo jam de antikve. Pekinanoj estas lernemaj. Hodiaŭ la etoso de legado estas pli forta ol antaŭe. En la ekonomia konstruado, por lerni modernajn teknikojn en konduktajn de eksterlande, oni energie legas librojn, ankaŭ la komercistoj tion faras por disvolviĝo de sia afero.

Ĉiujare en Pekino okazas libro-foiro. En 1997 la foiro estis pli fruktodona. Emeritoj sin direktis tien, ĉar ili havis pli da tempo por legado. Gejunuloj tie elektis librojn fakajn kaj nefakajn. Junaj gepatroj vizitis la foiron kune kun sia infano por aĉeti infanajn librojn. En nur 10 tagoj oni vendis pli ol 500 000 ekzemplerojn da diversstemaj libroj. En Pekino estas multaj librejoj, kiuj troviĝas en diversaj distriktoj. Kaj krome, estas ankaŭ multaj budoj de libroj kaj gazetoj, kio tre oportunas al la legantoj. Por ke la urbanoj pli facile akiru sciojn, oni funkciigas multe da vesperaj lernejoj, kie energie lernas junaj kaj maljunaj urbanoj.

---

# Legemaj pekinanoj

Teksto kaj fotoj de LI CHUNGENG


## Aĉeto de infanlibroj







Apud budo de gazetoj



Bildlibroj ŝatataj de infanoj



Subskribado de aŭtoro

# Pri san-protekto

*Ekde la januara numero 1998 legiĝos en tiu ĉi rubriko artikoloj pri la ĉinaj teorio kaj metodoj de san-protektado. Ni esperas, ke tio estos utila al niaj legantoj. Se ili deziras nian helpon ĉi-rilate, skribu al ni, kaj ni faros ĉion eblan por kontentigi ilin. Ni deziras al ili eternan sanon.*

**La Red.**

**K**IOM da jaroj homoj povas vivi? La klasika ĉin-medicina verko *Huang Di Nei Jing* diras, ke homoj povas vivi pli ol 100 jarojn. Sed nuntempe la meznombra vivdaŭro de la homo estas ne tiom longa. Do oni energie serĉas rimedojn por longe vivi kaj faras senĉesajn praktikadon kaj resumadon de spertoj en tio, tiel ke kreiĝas la teorio de san-protektado.

Ĉinaj san-protektaj teoriistoj alte taksas spiritan kulturadon, opiniante, ke la animstato ludas gravan rolon por la homa sanstato. Laŭ la teorio la plej gravaj por la spirita kulturado estas mensa kvieteco kaj malmulta avido. Pro tio oni nepre devas klare scii, kio strikte rilatas al liaj sano kaj vivo, kaj kio ne. Ni kreas materiajn riĉaĵojn nur por protekti niajn sanon kaj vivon. Ni neniel devas detruiri la lastajn sole por ĉasi la antaŭajn. Ni devas ion aspiri, sed ne multon avidi, ni devas strebi, sed ne damaĝi nin mem. Konstante teni bonan animstato utilas al la sano kaj vigeleco.

Laŭ la ĉina san-protekta teorio ĉiu korpoparto de la homo rilatas al la organismo kaj la sanstato de la korpoparto spegulas tiun de la organismo. Tial la sanstato de la korpoparto influas sur tiu de la organismo. Oni bone scias, ke la ĉina san-protekta teorio alte taksas la funkcion de la dentoj, oreloj, okuloj kaj masaĝon de la plandoj. Tio rilatas ne nur al la dentoj, oreloj, okuloj kaj piedoj mem, sed ankaŭ al la sanstato de la tuta korpo kaj eĉ al la vivo. Pro tio oni do facile komprenas, kial ĉin-medicinaj kuracistoj efike kuracas pere de la oreloj la malsanojn de la homaj visceroj kaj diagnozas malsanojn de la tuta korpo nur rigardante la

manojn kaj piedojn. La ĉin-medicinaj akupunkturo, mokso kaj masaĝo estas ja bazitaj sur tiu teorio. Ekz. masaĝo de la heliksoj estas utila ne nur al prevento kaj kuraco de surdeco, sed ankaŭ al sanigo de la renoj.

Ĉinaj san-protektaj teoriistoj opinias, ke la homoj ne povas disiĝi de la natura medio. Sur la homan korpon faras influojn grandan kaj malgrandan la alterno de la kvar sezonoj, la humideco kaj varmececo de la loko, la diferenco de la grundo kaj tiu de akvo, la ŝanĝiĝoj de la klimato, formo de luno, sunaj makuloj kaj eĉ de la astroj kaj konstelacioj. La pozitivaj influoj utilas al la homa sano kaj la negativaj kaŭzas fiziologian ŝanĝiĝon aŭ eĉ malsanon. Aktive sian sanstato reguligi kaj plibonigi por adaptiĝi al la medio kaj eviti diversajn malutilajn faktorojn por la korpo kaj eĉ transformi la naturon laŭ sia bezono, forigi danĝerajn faktorojn utilas al la plilongigo de la vivo kaj san-protektado. Laŭ la ĉin-medicina teorio vento, varmo, malvarmo, trosekeco kaj malsekeco ĉiu povas kaŭzi malsanojn, tial necesas eviti ilin laŭeble. Iuj malsanoj atakas homojn en la difinita sezono, ekz. la frosta vintro povas kaŭzi aŭ gravigi kardio- kaj cerbovaskulajn malsanojn, ĉar la sango facile koaguliĝas pro malvarmo precipe ĉe malfortuloj.

En la okuloj de multaj homoj la teorio de san-protektado estas tre komplika, sed fakte ne. Ĝi estas resumo de spertoj en la homa vivo kaj strikte rilatas al la ĉiutaga vivo. Estas ja multegaj metodoj por san-protektado, tamen plej gravas, ke ili ĉiuj devas konformigi sin al la naturo. ■

JIA FA:

---

# Saniga ekspreso

---

**V**ENIS saniga ekspreso!" En Fuyang, Anhui-provinco, oni konigis la novaĵon unuj al aliaj. Por tieaj malriĉaj suferantoj de katarakto, la ekspreso, kiel anĝelo de lumo, portis al ili esperon.


La ekspreso estas blua trajno el 4 vagonoj, simila al malgranda hospitalo kun operaciejo, konsultejo, radiejo... Ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estas modernaj. Pli ol 20 kuracistoj kaj flegistinoj laboras ĉi tie. Ili venis el grandaj hospitaloj de Pekino kaj Hongkong.

La ekspreso, donacita de Komisiono de Hongkong "Morgaŭ Estos Pli Bela", startis de Hongkong la 1-an de julio. Utiligante fervojojn, ĝi medicine servas al popolo de malproksimaj lokoj. Ĝi en mallonga tempo donas efikan servon al ĉinaj kamparanoj, kiaj operacio de kataraktuloj, kuraco de sekvaĵo de poliomjelito kaj surdeco. Fuyang estas unua haltejo de ĝia ĉi-foja vojaĝo.


Antaŭtagmeze, helpate de sia filo, Fan Xiu-ying venis al la tria vagono. Tie flegistino vestis ŝin per specialaj galoŝoj, bluaj ĉapo kaj robo, kaj kondukis ŝin al la operaciejo. Ŝia filo diris al mi, ke antaŭ 3 jaroj ŝia dekstra okulo ekfunkciis malbone kaj estis diagnozita kiel suferanta de katarakto.



Maljunulo reakiris la vidkapablon post kuracado.



Korpo-ekzameno



Suferanto de katarakto kuracata



Por la operacio ŝi devas pagi 1 000-2 000 juanojn. Ŝiaj gefiloj ekŝparis monon por tiu sumo, sed malfacile.

Informiĝinte pri la saniga ekspreso, li tuj anoncis pri la malsano de sia patrino. Post unu semajno Fan Xiuying kaj aliaj fariĝis la unuaj kuracatoj de la ekspreso. Kiam li sciis ke fama kuracisto senpage faros operacion al lia patrino, li radiis de ĝojo. Fakte, ĉiuj, kiuj vizitis la ekspreson, donis grandan atenton al la kuraco. En Fuyang estas 13 milionoj da popolanoj, el kiuj 0.15% suferas de katarakto. La volontula medicina taĉmento de la saniga ekspreso unue servas al la plej malriĉaj popolanoj kaj la ĉefaj laboruloj.

Yingdong-hospitalo de Fuyang estas bazo de la saniga ekspreso, post operacio la malsanuloj estas daŭre kuracataj tie. Tie mi renkontis Liu Hongyu, kiu estis resaniĝinta kaj elhospitaliĝonta. Kiam ŝi studis en mezlernejo, ŝia maldekstra okulo blindiĝis, oni ne sciis pro kio. Ŝi devenis de kamparana familio kaj ne havis monon por la kuraco. Ŝi eniris en belartan lernejon antaŭ nelonge. Ŝi pensis, ke ŝi ne povas daŭrigi la studadon. Tiam venis saniga ekspreso, dank' al kies kuraco ŝia maldekstra okulo denove akiris vidkapablon kaj ŝi

revenis la lernejon. “La mondo estas bela, la kuracistoj — bonkoraj,” ŝi diris kun rideto.

La alia tasko de la saniga ekspreso estas kulture lokajn medicinistojn. Oftalmologoj krom kuraco en la ekspreso donas ankaŭ lecionon al lokaj kuracistoj.

Estro de oftalmologia sekcio de iu loka hospitalo diris al mi, ke li multe lernis en la leciono far prof. Sun pri traktado de kristalino antaŭ kaj post operacio. Post operacio, en la hospitalo de prof. Sun, oni prenas ordinarajn kontraŭinflamajn medikamentojn nur 3 tagojn, sed en alia hospitalo, oni devas preni multe da antibiotiko kaj hormono. Li diris al mi: “Por malpezigi la ŝarĝon de la malsanuloj, ni devas preskribi medikamentojn kiel eble plej malmulte.” Por lerni de specialistoj, li decidis, ke ĉiuj kuracistoj de lia sekcio laŭvice servu en la ekspreso.

La saniga ekspreso laboris en Fuyang pli ol unu monaton kaj faris operacion por 190 suferantoj, donis 8 lecionojn, senpage diagnozis 300 homojn. Nun la saniga ekspreso iras al la sekvanta stacio. Pro bona efiko de la ekspreso, la komisiono “Morgaŭ Estos Pli Bela” decidis donaci pliajn trajnajn hospitalojn. ■

## ĈINAJ METIARTAĴOJ



# Bronzaĵo kun figuro de rajdanto

Estas diversaj specoj de bronzaĵoj el alojo de kupro kaj stano, kiaj trinkilo, manĝilo, vinujo, instrumento, mezurilo kaj pesilo. Jam de la 22-a jc a.K. ĝis 256 a.K. ĉinaj fandistoj elfandis belajn bronzaĵojn laŭ malsamaj kvantoj de kupro kaj stano.

Bronzaĵoj de diversaj periodoj distingiĝas per malsamaj stiloj. Iuj estas malpezaj kun simplaj desegnoj kaj aliaj

— pezaj kun krudaj desegnoj. Ili surhavas bildon de bestoj aŭ bildon pri ĉasado aŭ festeno delikatlinie faritan. Multaj bronzaĵoj portas sur si epigrafon kaj havas grandan valoron por historia studado.

La bronzaĵo kun figuro de rajdanto, elterigita en 1995 en Yunnan-provinco, estis farita en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. - 25 p.K.).







Vintro en Estonio  
**AIME SAARKOPLI**  
(Estonio)



Montaro en  
centra Italio  
**UGO PENSABENE**  
(Italio)

ISSN 0032-4361

